

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
99-a jaro • n-ro 1188 (1) • **Januaro 2006**

Dank' al afrikanoj dek kvin junaj esperantistoj en Kragujevac



**La projekto
AKEL**

**Malferma
Tago**

**Novjara mesaĝo
de la prezidanto**

**Seminario en
centra Afriko II.**

**25-jariĝo de
Afrika Agado**

**Eŭropa forumo
pri plurlingvismo**

**Esperantomuzeo
en Vieno**

**Albert Einstein
pri Esperanto**

Esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@stonline.sk;
revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio
aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero
kostas EUR 3,50.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p.
550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p.
90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur
ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-
1751, ✉ uea@co.uea.org
TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 3 Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA: Ni volas plibonigi la mondon (Renato Corsetti).
- 4 Seminario en centra Afriko II. (Tereza Kapista).
- 6 25-jariĝo de la Afrika Agado (Gbeglo Koffi).
- 7 Ankaŭ vendistinoj lernas Esperanton (Gbeglo Koffi).
- 8 La projekto AKEL: Renkontiĝis alternative komunikantaj lernejoj (Mariana Gencheva, Luisa kaj Vittorio Madella).
- 9 El la historio: Albert Einstein pri la internacia lingvo (Detlev Blanke).
- 10 Malferma Tago (GaKo). Sep bibliotekoj ricevis Thorsen-apogon.
- 11 Lingva situacio en Eŭropo: La unua eŭropa forumo pri plurlingvismo (C. Nourmont).
- 12 La Esperantomuzeo en Vieno en nova vesto (Herbert Mayer).
- 13 Loke – Fake – Persone: Brazilo. Ĉinio. Serbio kaj Montenegro. Katalunio. OSIEK-Premio 2005.
- 14 Ĉeĥio. Senegalio. Kroatio. Nova sekretario por la CO. Koreio. Ĉinio. Tajvano.
- 15 Recenzoj: Antonio Velén pri *Ilustrita frazeologio*. Jean Marin pri *Une langue pour l'Europe? Mais oui! Pour sauver les langues de l'Europe*.
- 16 Renato Corsetti pri *Manlibro pri instruado de Esperanto*. Anna Löwenstein pri *Mi ne estas Mona Lisa*.
- 17 Laste Aperis.
- 18 La angulo de EVA: Leonard N. Newell: *El «La ruĝa tramo»*.
- 19 Oficiala Informilo. Esperanta Promeso-Banko (Tim Morley). Kio estas STEB? Estas tempo rekitizi por 2006.
- 20 Tra la mondo: Sukcesa antaŭpremiero en Jokohamo (Raja kaj Viktor Kudrjavcev). Ekspozicio en Kopenhaga Librofoiro (Ileana Schröder).
- 21 Hispana tago en Pollando (Augusto Casquero). Galabovo, dommastro de la 57-a Bulgara (Kanoj Kanev kaj Georgi Mihalkov).
- 22 Forpasoj. Stato de la UK-aligĝoj. Nova membrokarto de UEA. Internacia Semajno de Amikeco. La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK).

KOVRILPAGE: Saša Pilipović, aktoro (en la unua vico la unua dekstre), kiu jam ludis en multaj UK-oj, estis la organizanto de la kurso en Kragujevac. La kursojn ĵus finis 15 partoprenantoj (legu pli sur la paĝo 13). *Se mi, membro de la Esperanto-klubo de ... ne sukcesas (aŭ eble eĉ ne provas) konvinki la lokan lernejestron starigi kursojn pri Esperanto en ... mi ne devus lamenti, ke ILEI ne sukcesas konvinki UN-on instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj de la mondo aŭ almenaŭ de EU-landoj!* (legu pli en la apuda Novjara saluto de la prezidanto).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39 06 957 57 13; ✉ +39 06 957 66 33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: S-ino Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio; ☎ +46 (0)8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉ +31 (0)20 642 18 53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Azia Agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎/✉ +86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: Prof. Amri Wandel, N-ro 767, IL-71908 Makabim, Israelo; ☎ +972 (0)8 926 44 62 (h); +972 (0)2 658 68 60 (of); ✉ +972 (0)2 658 44 61; ✉ amri@huji.ac.il.

Landa kaj Regiona Agado: S-ino Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎ +53 (7) 539201 (h); +53 (7) 404484 (of); +53 (7) 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka Pietiläinen, Soidintie 8 E 28, FI-00700 Helsinki, Finnlando; ☎ +358 (9) 8036149 (h); ✉ +358 (3) 215 6248 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Ni volas plibonigi la mondon

Karaj esperantistoj,

Ĉi tiu rito de nov-jaraj salutoj kiel ĉiuj ritoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. La avantaĝo estas, ke ĝi estas io konata kaj donanta certecon. Nenio esence nova aŭ revolucia povas esti en nov-jara saluto. La malavantaĝo estas, ke nenio nova aŭ revolucia esence estas en nov-jara saluto.

Ni provu kunmeti avantaĝojn kaj malavantaĝojn kaj diri ion tre malnovan, kio, tamen, por kelkaj novaj esperantistoj ŝajnos revolucie nova.

Kial ni estas membroj de UEA? Kial ni estas esperantistoj entute? La unua tago de la jaro estas la ĝusta tago por demandi sin pri tio. La ĉefa fonto, al kiu ni, legantoj de ĉi tiu revuo, devas reiri estas la statuto de UEA, kaj ni devas legi kune la celojn, kiujn UEA (kaj ni, aliĝintoj al ĝi), deklaras realigindaj.

La artikolo 3-a de la statuto marmore firme tekstas:

La celoj de UEA estas: (a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto; (b) agadi por la solvo de la lingva problemoj en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon; (c) plifaciligi la ĉiuspecajn spiritaĵojn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo; (ĉ) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Alivorte ni estas kune en UEA unuavice por disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto. Tio estas la unua celo, kiun la redaktintoj de la statuto metis en la komenco, do, verŝajne ĝi estas la plej grava. Temas pri celo rekta kaj klara kaj desubisma, alivorte, kiu postulas konvinki ĉiam pli grandan nombron da normalaj homoj lerni Esperanton kaj uzi ĝin. Ne estas multo dirinda pri ĉi tiu celo. Simple ni memoru, kiu estas nia vera tasko kaj ni demandu nin, kial la labor-plano de UEA tiom insistas pri informado kaj instruado, dum multaj el ni trovas ke turismo kaj Pasporta Servo estas tre pli allogaj okupoj, por ne paroli pri verkado de poemoj je la sun-subiro.

Bonvolu atenti: mi ne estas diranta, ke oni ne verku poemojn dum la suno subiras, aŭ ke oni ne turismu, kiam oni povas. Mi nur estas diranta: ni ne miksu celojn kaj ne ŝanĝu la rang-ordon de la statutaj celoj. Kiam mi parolas pri UEA evidente mi parolas ankaŭ pri ties eroj, inkluzive de la landaj asocioj kaj lokaj kluboj. La ĉefa celo de la Esperanto-klubo de Palestrino (la urbo, en kiu mi vivas) ne povas esti nur konigi Palestinion kaj ties mirindan historion kaj kulturon tra la mondo. Tiu estas la dua celo. La unua estas disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto en Palestino mem. Se mi, membro de la Esperanto-klubo de Palestrino,

ne sukcesas (aŭ eble eĉ ne provas) konvinki la lokan lernejestron starigi kursojn pri Esperanto en Palestrino, mi ne devus lamenti, ke ILEI ne sukcesas konvinki UN-on instrui Esperanton en ĉiuj lernejoj de la mondo aŭ almenaŭ de EU-landoj.

Due venas la celo utiligi Esperanton por la solvo de la lingva problemoj en internaciaj rilatoj kaj por faciligi la internacian komunikadon. Tio signifas, laŭ la statuta ĵargono, prezenti Esperanton al ĉiuj internaciaj organizaĵoj, UN, Unesko, Eŭropa Unio, Organizaĵo por Afrika Unuiĝo ktp kaj peti ilin agnoski ĝin kiel rimedon por justa internacia komunikado. Ankaŭ ĉi tiu celo rilatas al la ekstero. Oni rajtas havi malsamajn ideojn pri la utileco de tiu agado, sed certe ĝi estas agado ne nur farinda sed fareda. Mi mem havas la impreson, ke ni sukcesas fari pli malmulte ol ni devus. Ankaŭ ĉi-rilate eble estas sintrompo. Oni pensas, ke la agado ĉe Unesko estas agado farata en Parizo kaj la agado ĉe la instancoj de Eŭropa Unio estas agado farata en Bruselo. Tio estas vera nur ĝis iu tre malgranda punkto. La ĉefa agado ĉe Unesko aŭ ĉe EU estas farata lande kaj loka. Se en Kipro ne estas eĉ unu esperantisto, estas tute vane alparoli la kipran parlamentanojn en Bruselo aŭ Strasburgo aŭ la kipran delegitaron ĉe Unesko. Se la landaj asocioj en kelkaj EU-landoj okupiĝas pri ĉio, krom pri alparolado de siaj naciaj eŭropaj parlamentanoj, nenio estas atingebla en Bruselo.

La tria kaj kvara celoj, finfine, venas al individuoj kaj al ilia feliĉa rilatado trans diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo kaj akirado de fortika sento de solidareco inter la membroj de UEA kaj al disvolvo de ili de kompreno kaj estimo por aliaj popoloj.

Efektive kiam temas almenaŭ pri la membroj de UEA, mi kredas, ke tiujn celojn ni konscie provas realigi per la konataj iloj. UEA eldonas revuojn vaste legatajn tra la mondo, funkciigas la plej grandan libroservon, aranĝas la ĉiujarajn universalajn kongresojn, rilatas papere aŭ rete kun proksimume ĉiuj esperantistoj tra la mondo.

La sukcesa realigo de ĉi tiuj lastaj celoj, tamen, ne povas kontentigi nin, ĉar ni ja devas realigi ankaŭ (ĉu ĉefe?) la unuan kaj la duan. Ni ĉiam rediras al ni mem, ke la mondo nun estas pli malfacila ol ĝi estis en la tempoj de Zamenhof, ke nun ni estas regataj de tutmondaj senkoraj mastroj profit-amaj, sed ĉu vere estas tiel? Eble ne, eble Zamenhof kaj liaj samtempuloj nur estis pli kuraĝaj ol ni, kaj kuraĝis batali kontraŭ la caroj kaj la aliaj perfortaj reĝimoj de tiu tempo. Kaj kiel sufiĉe laŭdi la postajn generaciojn, kiuj sukcesis porti Esperanton tra kruelaj mondmilitoj en Eŭropo kaj ekster Eŭropo?

Seminario en centra Afriko

La konata beograda Cseh-instruistino Tereza Kapista gvidis en Burundo internacian Esperanto-seminaron. Jen la dua parto de ŝia vojaĝraporto.

Antaŭ mia vojaĝo al Burundo mi dum unu jaro korespondis kun Birindwa Mushosi, la organizanto de la seminario. Li sendis sian foton, por ke mi rekonu lin ĉe la flughaveno. Montriĝis ke li estas juna homo kaj mi povus esti – lia avino. Kiam mi alvenis, Birindwa vere salutis min tiel: "Bonvenon, avino!" Ekde tiu momento mi por ĉiuj, dum la tuta seminario kaj ankaŭ poste en retmesaĝoj, estis "la avino Tereza". Mi elkore akceptis tiun "titolon".

Kiam komenciĝis la seminario, mi vidis ke Birindwa ne sola faris la organizadon. Matene, kiam mi venis al la lernejo, akompanis min Japhet Bayori Ntunzwenimana, kiu dum vesperoj estis kun seminarianoj. Li iris kun mi al ministerio kaj kun kelkaj aliaj al radiostacio. Sed nur en Rumonge mi vidis ke li estas la vera semanto de Esperanto en tiu parto de Burundo. Tie li instruis la unuajn esperantistojn, kiuj fariĝis bonegaj kunlaborantoj de la movado. Unu el ili, Jeremie Sabiyumva, faris la administran laboron, kontrolis la ĉeestantojn kaj dank' al li alvenis multaj seminarianoj, ĉar li instruis ĝejnulojn en Buĵumburo, kie li frekventas la lernejon. Mi nepre devas mencii Libere Midende, profesoron, kiu sukcesis kunvoki grupon de 40 studentoj. Al tiu grupo aliĝis eĉ la direktoro de la liceo, kies ejojn ni uzis. Valora helpanto estis Asman Sadi, kiun ĉiuj nomas Hassumani. Li lernas en Buĵumburo, sed vivas en Rumonge. Li akompanis min en miaj liberaj horoj, ni iris kune al bazaro kaj al kudrejo, kie brodistoj el Sirio brodas virinajn vestaĵojn per specialaj maŝinoj. Kiam ni iris apud domo ĉirkaŭita de alta brika barilo, mi demandis: "Kio estas tio?" – "Hospitalo por virinoj suferantaj pro aidoso. Mi konstatis: "Ĉi tie do ili estas kuracataj". – Ne, nur alportataj por morti, kuracilo ne ekzistas! Same ekzistas vira hospitalo. Hassumani estis kun mi dum mia restado en Rumonge, kie li provizis min per manĝaĵoj kaj akvo, kiun mi devis aĉetadi. En Rumonge li surbendigis kelkajn kantojn, kiujn mi instruis, kaj mi bedaŭras ke mi ne povis kopii ilin, ĉar en la lasta tago, kiun ni dediĉis al kantado kaj solena fermo de la seminario, ne estis elektro. La sekvan matenon mi devis forveturi. Hassumani prenis la taskon esti bibliotekisto, ĉar de la donacitaj libroj oni fondis bibliotekon en lia ĉambro, ne havante aliajn ejojn por kunvenado. En Rumonge ĉiuvespere dum 1-2 horoj ne estis elektra lumo kaj mi devis uzi kandelon, aŭ ripozi en silento kaj mallumo, kiu tie estas jam de la 19-a horo. En tiu tempo venadis al mi Nestor Ndayongeje, kiu tie baldaŭ fariĝos pastro. Li estas 28-jara junulo, entuziasma pro la ideo de Esperanto. Mi akceptis instrui ankaŭ lin kaj peris por li la kontaktojn kun IKUE, de kiu li nun ricevas esperant-lingvaj gazetojn. Li promesis instrui Esperanton en Rumonge. En tiu urbo troviĝas katolika preĝejo, konstruita en 1888 kaj renovigita en 1988. Ĝi estas la plej malnova konstruaĵo en la urbo. Mi vizitis ĝin por vidi sanktan meson. Meze de la preĝejo staris koruso, antaŭ kiu sidis virino, tamtamanta sur kvin tamtamoj. Estis tie ankaŭ elektra piano kaj la koruson gvidis junulo. Ili kantis per kvar voĉoj, bele kiel anĝeloj. Kiam venis la parto de Haleluja, ĉiuj ekstaris kaj levis la manojn al la ĉielo, surloke moviĝadis kaj tiam la tamtamoj sonis plej forte. Foje ili laŭritme



Komencantoj en Rumonge



La klaso en Rumonge



Gajaj stratinfanoj en Buĵumburo



La seminarieja kuirejo



Tamtamado en preĝejo



Brodistinoj sur lerneja korto



Tamtama programo ĉe Tanganjika



La plej aktivaj seminarianoj

aplaŭdis. Kiam ĉe la fino oni devis doni la manon unu al la alia, kelkdeĵo kuris al mi, dezirante al mi "amahoro", kio en la kirunda lingvo signifas "paco".

Mi vizitis ankaŭ "fabrikon" de sapo, kiu estas la eksport-produkto de Burundo. Oni produktas ĝin el la oleo de palmoj. Mi metis la vorton fabriko en citilojn, ĉar ĝi fakte estas manufakturo. Ili elpemas el muelitaj kernoj de palmaj fruktoj la sukajn kaj kuiras ĝin. Sur la korto staras vicoj da ladaj bareloj, sub kiuj oni simple faras fajron. La strato plenas de fumo! La oleo, kiu estas pli malpeza ol la akvo, supreniras kaj oni forprenas kaj verŝas ĝin en aliajn barelojn kun kaŭstika sodo, miksas, kaj jen ekestas la sapo. La mason oni verŝas en formojn kaj post kelkaj tagoj oni povas ĝin tranĉi. La plej terura afero estas ke la restaĵoj de tiu "fabrikado" oni metas antaŭ la domojn kaj nokte bruligas ĝin. La fumo nokte tre ĝenas kaj restas cindro, kiu kovras la stratojn kaj fiodoras.

En Rumonge ni vizitis lagon, kie virinoj lavas vestaĵojn kaj infanoj ĝuas la akvon kaj naĝetas. Tie iu avino prenis bebon de la patrino kaj donis ĝin en miajn manojn, ĉar "tio alportos al ĝi feliĉon". Alia simpata afero okazis kiam mi sidante en buso estis karesita de nigrulino, kiu de sur mia haŭto "prenadis la koloron" kaj ŝmiris sin per ĝi. Poste ŝi ridis, dirante ke ŝi konscias ke tiamaniere ŝi ne fariĝos blankulino, sed deziris senti la molecon de mia haŭto. La infanoj surstrate manpremadis min kaj mi devis diri "Gambo" aŭ "Amahoro". Tiam ili ridis kaj longe kurante post mi akompanis min.

Mi konstatis, ke multaj infanoj havas haŭtmalsanon sur la kapo, blankajn makulojn, kaŭzitaĵo de iuj nevideblaj vermetoj, kiuj nutras sin per la harradikoj. Mi konsultis la lokan kuraciston kiu diris la diagnozon: *Tinea capitis*. La medikamento ekzistas kaj haveblas en tiu urbo, importita el Hindio, sed la kuracado de unu infano kostas 2,5 eŭrojn. Oni havas po dek infanojn kaj tute ne havas monon por kuraci ilin. La Stato tion ne financas. Tial mi petas esperantistojn helpi ke la infanoj liberiĝu de tiu terura malsano. La mondonacon eblas sendi al la UEA-konto aneb-d. Mi mem financis la resaniĝon por dudek infanoj, kiuj vizitis mian kurson. Mi konstatis ke jam post 15 tagoj foriĝis la blankaj makuloj kaj post 20 tagoj la malsano tute malaperis. En unu klaso estas po 80-120 lernantoj kaj sidas po tri en unu benko. En unu vico estas 17 benkoj.

Dum mia restado estis striko. La instruistoj strikis ne por pli altaj salajroj, sed por havi instrumaterialojn. Kiam mi instruis geografion, mi petis ke iu alportu mapon. Neniu havis, eĉ ne diplomita studentino pri geografio. Instruisto, kiu venis el Kongolando, kiam li devis legi, iradis al fenestro kaj tie starante legis la tekston de la leciono. Al mia demando ĉu li ne havas okulvitrojn li respondis: tio multekostas. Mi eksciis ke la instruistoj ne havas sanasekuron. En tiu lando pli ol 50% de la loĝantoj restas analfabetoj...

Alia afero kiu zorgigis min estas ke ĉiuj uzas potojn kaj aliajn ujojn – el aluminio. Sur apuda foto vi povas vidi kiel oni kuiras por la seminarianoj. Tiel estas ĉi, oni kuiras antaŭ la domoj kaj en bazaroj vendigas nur tiaj aluminiuj ujoj. Ni en Eŭropo scias ke tio estas venena. La manĝado okazis tiel, ke la seminarianoj staris ĉirkaŭ la tablo, sur kiu estis nur unu ujo, kaj prenas mane la manĝaĵon, farante el la kaĉo bulketojn kaj trempante ĝin en ujo kun fazeoloj.

Multajn esperantistojn mi ne menciis laŭ la nomo, ili pardonu tion al mi, sed samtempe mi ankaŭ dankas pro ilia diligenteeco kaj entuziasmo al nia lingvo, de kiu ili esperas pli bonan vivon.

Tereza Kapista



25-jariĝo de la Afrika Agado

En la Stokholma UK en 1980 Renato Corsetti, tiama estrarano de UEA pri regiona agado, prelegis kaj invitis homojn al kunlaboro, por verdir aliajn kontinentojn. Ĝis tiam la movado en Afriko estis preskaŭ nekonata.



Hans Bakker

Hans Bakker, kiu multe aktivis en TEJO, kaj precipe en KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) taskis al si verdir la nigran kontinenton.

La 15-an de septembro 1980 li skribis siajn unuajn leterojn kadre de sia laboro kiel komisiito de UEA pri Afriko. La 15-an de septembro 2005 do pasis 25 jaroj kaj la bilanco montras multon. Esperanto atingis multajn angulojn de la kontinento. Okazis kvar afrikaj kongresoj kaj multaj naciaj. Afrikanoj ne nur lernis de Hans Esperanton, sed ankaŭ ricevis kaj pluricevadas de li la sukono de sia vivo: lernantoj finstudis, metilemanoj fariĝis majstroj, senlaboruloj ricevis laborlojn, malsanuloj resaniĝis; infanoj edukiĝas, multaj afrikanoj havas pli realan komprenon pri la vivo. La afrikaj esperantistoj adresas sian dankon kaj gratulas pro tiu ĉi datreveno al Hans Bakker kaj al UEA, kiu nomumis lin kiel komisiiton kaj forte subtenis lin.

Oni ne forgesas ankaŭ pri dekoj da aliaj aktivuloj, kiuj partoprenis en tiu ĉi agado. Afrika Agado de UEA ja ne estas laboro de unu sola persono, sed de multaj aktivuloj, helpemuloj, sendantoj de libroj, instruantoj, korespondantoj, donacantoj al Afrika Fondado kaj Afrika kapitalo.

Afrikaj esperantistoj deziras al Hans Bakker kaj UEA pliajn longajn jarojn kun sia verko Afriko, ke ĝi multe pli verdiru.

Grandan ĝojon manifestis la afrikaj esperantistoj pri tio, kaj Togolandanoj dediĉis dutagan celebradon de la evento.

La 15-an de septembro estis la unua tago de la nova lerneja jaro 2005-06 en la Instituto Zamenhof. Tiam ne abundis gelemantoj, ĉar ili atendis la oficialan daton por eniri la lernejon. Sed la instruistoj estis tie, kaj la okazo memorigis al ili la eventon de la 15-a de septembro en la historio de Esperanto en Afriko. Okazis komuna manĝo kaj prelego pri la signifo de la 15-a de septembro en la vivo de Esperanto en Afriko. Ĉiuj komprenis, ke sen tiu tago hodiaŭ ne estus la



Instituto Zamenhof en Togolando, kiu vivtenas ilin. La 25-jara ekzistado de Afrika Agado ne estas io bagatela. UEA kun Hans Bakker kaj aliaj kunlaborantaj organizaĵoj faris por la afrika movado dum tiuj jaroj tre multe kaj la afrikaj esperantistoj esprimas siajn dankojn al ĉiuj. Ili pliafoje dankas

al UEA pro ties nova engaĝiĝo por la antaŭenigo de la Afrika Agado, disponiganta al ĝi eron en sia spezkonto. Pliaj jaroj pliprogresu la movadon en Afriko kaj ties esperantistoj taskas al si sekvi la paŝojn de siaj ĉefaj vartantoj Hans Bakker kaj UEA.


Gbeglo Koffi

Ankaŭ vendistinoj lernas Esperanton

La 2-an de novembro 2004 komenciĝis la instruado de Esperanto en Instituto Zamenhof kiel aldona lernobjekto. Pli ol cent gelemantoj tiel lernis la lingvon en la lerneja jaro 2004-05.

Tiam ankaŭ la lokaj vendistinoj de nutraĵoj ŝatis eklerni la lingvon, sed ne povis tuj komenci, kvankam instruisto estis je ilia dispono. La 19-an de septembro 2005 komenciĝis la nova lerneja jaro, kaj pluiras nun la Esperanto-kurso por gelemantoj. Instituto Zamenhof pli kaj pli vestas sin Esperante kaj galantis antaŭ la virinoj. Ili ne povis rezisti.

La 18-an de septembro 2005 masonisto alfiks sur la muron de la instituto jenan tabuleton:



Kiu eniras la instituton, tiu tuj legas kaj provas kompreni. Reirante hejmen post vendado de nutraĵoj al gelemantoj, la

vendistinoj ariĝis antaŭ la tabuleto kaj laŭtleĝis. Ili klopodis kompreni la tekston kaj – decidis lerni la lingvon.

Du tagojn poste la vendistinoj eniris la instituton kun kajoroj en la manoj. "Hodiaŭ ni eklernos Esperanton. Ankaŭ ni volas paroli ĝin." La pedagogia direktoro Attaglo Elom devis enkonduki la kurson ankaŭ por ili kaj estis decidite, ke la vendistinoj lernos ĉiujdaŭde posttagmeze. La dua leciono okazis la 6-an de oktobro.

Eblas sendi salutkartojn al tiuj kuraĝaj virinoj: Instituto Zamenhof, Virina E-grupo, 11 BP 48 Lome, TOGO. Se vi decidus donaci instrumaterialojn, bonvolu aldoni en la adreson "s-ino Adoko Afiwa".

Gbeglo Koffi



3 Eble simple ni devas sekvi ilian ekzemplon, kaj ĉesi kvereli kaj disputi inter ni pri malgrandaĵoj, kiuj havas neniun rilaton al niaj unua kaj dua celoj, kaj kuraĝe rilati al la neesperantistoj.

Oni demandas min ofte: "Kiuj estas la nunaj defioj antaŭ la Esperanto-movado?" Mi ofte respondas: "La kutimaj". Ili estas esence du.

Unuflanke ni devas konvinkiĝi, ke ni ne faras ion facile fareblan, ĉar ni volas plibonigi la mondon. En nia malgranda kampo, per niaj tute etaj fortoj, sed ja ni volas plibonigi la mondon, kaj tion ni povos fari nur forprenante iom da privilegio de tiuj, kiuj nun havas ilin.

Poste ni devas konvinkiĝi agi ekvilibre kaj tolereme. Ni bezonas ĉiajn agadojn: desubajn [informado kaj instruado al normalaj homoj], desuprajn [informado kaj traktado kun politikistoj kaj internaciaj instancoj] kaj deflankajn [sciencaj studoj por apogi la aliajn agadojn]. Neniu havas la ŝlosilon

por la vero aŭ por la sola ebla maniero triumfigi Esperanton. Do, ni faru ĉion ekvilibre. Individuo rajtas pasie interesiĝi nur pri unu agad-speco, sed organizaĵoj (de la loka grupo supren) ne.

Tiu ekvilibro estas postulata ankaŭ inter agado en Eŭropo (la tradicia) kaj agado ekster Eŭropo. Estas klare ke en la nuna momento multe pli da homoj volas lerni Esperanton en suda Barato ol en norda Svedujo. Ni alfrontu ekvilibre la situacion!

Do, ni estas antaŭ nova jaro de laboro. Ni alfrontu ĝin kun certeco, ke el laboro venas rezulto. La agado en la pasintaj jaroj diras al ni tion. Se ni investis laboron en Kabulo, esperantistoj komencis aperi en Kabulo. Se ni ne investis laboron en Etiopujo, esperantistoj ne ekestis en Etiopujo. La afero estas tiel simpla.

Al ĉiuj bonan laboron kaj grandan ekvilibron en la laboro!
Renato Corsetti



Ferma ceremonio de la lerneja jaro 2004-2005 en Instituto Zamenhof: Maldekstre: Futbalmatĉo inter la instruistaj teamoj de Instituto Zamenhof kaj Instituto Montesquieu. Meze kaj dekstre: Kulmino de la ferma ceremonio – proklamado

de la rezultoj al la gelemantoj kaj ties gepatroj. La premiojn (lernolibrojn, kajorojn, skribilojn kaj stipendiojn) ricevis ne nur la plej diligentaj, sed ankaŭ la plej ĝentilaj kaj la plej respektemaj infanoj.

Fotoj: Gbeglo Koffi

Renkontiĝis alternative komunikantaj lernejoj

La projekto AKEL, Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj, estas projekto por helpi la solvon de la problemo de lingva diskriminacio en Eŭropa Unio. La partoprenanta lernejklasso lernas Esperanton dum la daŭro de la projekto, kaj eklernas aliajn fremdajn lingvojn, kiam ĝi vizitas siajn partnerojn. La projekto estas subtenata de la programo *Socrates* de Eŭropa Unio. La partoprenantaj grupoj (almenaŭ tri grupoj el tri malsamaj landoj) unuope kandidatiĝas per siaj naciaj *Socrates*-agentejoj.



La urbestro kune kun la urbodoma konsilantaro akceptis la gastojn en la urbodoma salono de Polski Trzemesz.

De la 6-a ĝis la 13-a de novembro 2005 okazis la unua renkontiĝo inter la delegacioj de la tri lernejoj, partoprenantaj en la projekto AKEL: mezlernejo "Canko Cerkovski" de Polski Trzemesz, regiono Veliko Tarnovo, Bulgario; Stata mezlernejo "Cavour" de Modeno, Italio, kaj mezlernejo "Sir Thomas Rich's School" de Gloucester, Gloucestershire, Britio. La renkontiĝo okazis en la bulgara urbo Polski Trzemesz kaj estis subtenata de la lernejestro Pavlina Mineva.

Por gastoj en Bulgario venis du italaj studentoj, Valeria Bocchini kaj Ermanno Tarracchini, kun siaj instruistoj Luisa kaj Vittorio Madella, kaj kvar britaj studentoj kun siaj instruistoj Elizabeth Stanley kaj Jacky Hewett.

En la bulgara lernejo renkontis ilin la respondeculino de la projekto s-ino Mariana Gencheva kaj multaj lernantoj kaj instruistoj.

La 9-an de novembro, post solena inaŭguro kun la eŭropa himno kaj la himnoj de Italio, Britio kaj Bulgario, la

tri lernejoj prezentis sin al la multnombra publiko pere de video-filmoj, faritaj de la lernantoj kaj de la instruistoj.

La italaj, britaj kaj bulgaraj geknaboj poste realigis kune afiŝojn, kiuj esprimis la signifon de paco kaj amikeco pere



de Esperanto. Tiuj afiŝoj kune kun fotoj kaj bildoj estos gardataj de la unuopaj lernejoj kiel studmaterialo. La lernantoj de la tri lernejoj ludis kune korbopilkon, dancis popularajn dancojn, kantis kantojn en Esperanto kaj ekskursis.

La bulgaraj gastigantoj en siaj belaj folkloraj kostumoj bonvenigis la gastojn pere de la tradicia pano kun salo kaj mielo. La eksterlandaj gastoj havis la eblon ĝui la delikatan kaj sinceran amikecan etoson en la lernejo kaj en la tuta urbeto. Ankaŭ la urbodomo kaj la urbestro kune kun la urbodoma konsilantaro akceptis la gastojn en la urbodoma salono de Polski Trzemesz (vidu la supran foton) kaj sendis pere de ili amikajn salutojn al la urbestroj

de Modena kaj Gloucester kun la propono, ke tiu ĉi paŝo povas esti la starto de tre grava kultura intersaĝo kaj de amikaj rilatoj, kiuj povus celi interurbajn ĝemeligojn.

La venonta paŝo en la realigo de la projekto estas kolektado de materialoj pri la moroj kaj festoj de la tri landoj por povi prepari prezentadon pri sia naskiĝlando kun ties kulturaj heredaĵoj kaj historie valoraj objektoj. Poste oni organizos konkurson pri desegnaĵoj kaj figuraj artoj pri la temo: "Mia fremdlanda amiko". La dua renkontiĝo de la delegacioj de la tri lernejoj okazos de la 2-a ĝis la 9-a de aprilo 2006 en Modeno (Italio).

La celoj de la AKEL-projekto, akceptita kaj financata de EU, konsistas el la konstruado de ideo de eŭropa kaj monda civitaneco de la junaj homoj en Eŭropa Unio kaj ni devas agnoski, ke la gejunuloj de la tri lernejoj estas forte engaĝitaj labori diligente por atingi ĉiujn celojn de la trijara kunlaboro.

Mariana Gencheva,
Luisa kaj Vittorio Madella



Albert Einstein pri la internacia lingvo

Foje oni asertas, citante fontojn, ke Albert Einstein (1879-1955) sin esprimis favore al Esperanto. Sed oni ankaŭ citas fontojn, kie li sin esprimis kontraŭ la lingvo aŭ eĉ subtenis alian projekton. Kio estas vera? Ĝustas, ke la Nobelpremiito sin kelkfoje esprimis pri internacia lingvo, sed kontraŭdire. La faktoj donas iom buntan bildon.

Esperanto

Albert Einstein transprenis la honoran prezidantecon por la 3-a SAT-kongreso, en 1923 (Kassel). Li skribis la 14-an de junio 1923 (Berlin) tute klare al Lanti: *Mi konsentas, ke vi faru min honora prezidanto de via kongreso kaj dankas vin pro la pruvo de simpatio, dezirante al via aranĝo plenan sukceson.*

Tamen pli ol du jardekojn poste li ne plu memoris pri la afero: La iama prezidanto de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, William Solzbacher, per letero de la 21-a de oktobro 1949 klopodis gajni la subtenon de la mondfama fizikisto por peticio favora al Esperanto, direktota al Unuiĝintaj Nacioj. Einstein respondis la 26-an de oktobro 1949 (Princeton): *Mi ne memoras, ke mi estis honora prezidanto de Esperanto-kongreso en 1923 en Kassel. Fakte estas, ke mi neniam interesiĝis pri la klopodoj enkonduki artefaritan lingvon, ĉar mi kredas ke la obstakloj superas la avantaĝojn de tia entrepreno. Pro tio mi sentas min nekapabla subskribi vian peticion.*


Tamen ne povas esti tute vera la aserto, ke Einstein neniam interesiĝis pri la temo. La sciencistoriisto Friedrich Herneck, aŭtoro de kelkaj libroj pri germanaj natursciencistoj, en la jaro 1978 en la eldonejo Der Morgen (Berlin) aperigis la libron *Einstein private*. Herta W. rememoras pri la jaroj 1927-1933. Herta Waldow (HW), la dommastruma helpistino de la edzino de Einstein, klare memoras pri la sinteno de Einstein al Esperanto. Sur p. 107 de la libro troviĝas jena dialogo kun la aŭtoro Herneck (FH), [kiu enŝovas koncizan klarigan komenton]:

FH: *Se mi bone memoras, vi iam menciis, ke Einstein interesiĝis pri Esperanto.*

HW: Pri tio sinjoro profesoro multe simpatias, por tiu ĉi lingvo, kiu devus servi por ĉiuj kiel interkomprenilo. Pri tio oni ofte parolis en Haberlandstrasse. Pro tio

mi entute scias pri Esperanto.

Komento de Herneck-DB: *La demando de artefarita mondlingvo, kiu devus servi kiel internacia helplingvo, estis ankoraŭ vigle diskutata dum la tiamaj jaroj, eĉ se ne tiom forte kiom antaŭ la unua mondmilito. Siatempo la kemiisto kaj Nobelpremiito Wilhelm Ostwald emfaze pledis por iu pli bonigita Esperanto, "Ido", kiun li rekomendis por apliko en la scienca literaturo. Oni rekomendis traduki en tiun ĉi artefaritan lingvon almenaŭ resumojn de artikoloj en fakaj revuoj. Sed li ne sukcesis pri tiu propono.*



FH: *Ĉu Einstein mem estis esperantisto? Ĉu li lernis kaj parolis Esperanton?*

HW: Tion mi bedaŭrinde ne scias. Sed mi scias, ke sinjoro profesoro forte interesiĝis pri tio.

FH: *Parolante pri la malfaciloj, kiujn Einstein havis kun la naturaj fremdlingvoj kaj pri lia intereso pri Esperanto, ni tute perdis la fadenon al la unua vojaĝo al Pasadena...*

Poste la konversacio turniĝas al alia temo. La impreson, ke Einstein favoris Esperanton, ankaŭ subtenas alia fonto: En *La Wachsmann-raporto* - informoj de arkitekto de Michael Grüning (Berlin: Verlag der Nation 1988), la arkitekto i.a. de la domo de Einstein en Caputh (ĉe Berlin), Konrad Wachsmann, memoras lige al la vizio de Einstein pri monda registaro jene (p. 132): *Einstein pensis pri oficiala lingvo por la tuta*

mondo, ekz. Esperanto de Zamenhof. Ĉiuj aliaj lingvoj pluekzistu kaj same la kulturoj.

Anglic

Ĉirkaŭ la jaro 1930 R. E. Zachrisson, sveda profesoro pri angla filologio, publikigis planlingvan projekton kun la nomo "Anglic". Ĝi baziĝas je la angla sed havas simpligitan ortografion. Komence de la 30-aj jaroj oni forte varbis por Anglic. Oni ankaŭ klopodis gajni la subtenon de konataj intelektuloj. Albert Einstein subtenis ĝin, kio vekis negativajn komentojn en la esperantista gazetaro. Tiam, ok jarojn post la 3-a SAT-kongreso, ŝajne Einstein ankoraŭ iom memoris pri sia honora prezidanteco. Almenaŭ li probable akceptis iun tian atentigon de la esperantistino Margarete Upmann el Berlin kaj reagis al ŝia demando en letero de la 7-a de oktobro 1931 (Caputh ĉe Potsdam): *Vi tute pravas. Ja al mi estas tre malagrabla, ke oni metis mian nomon en la kuntekston kun la Anglic-movado. Tio okazis ne tute sen mia kulpo, ĉar mi esprimis min favore pri la plano. Mi tamen vere devas diri al mi, ke mi komprenas tro malmulte pri tiaj lingvaj problemoj, por povi juĝi. Do estas devo, lasi juĝi la juĝkapablulojn. Estonte mi detenas min de ĉiu opini-esprimo.*

D-ro Talmey kaj Arulo

Post la menciita letero apenaŭ pasis du jaroj, kaj Einstein tamen sin esprimis denove pri la problemo de internacia helplingvo. En 2004 prof. Humphrey Tonkin transdonis al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno dokumentojn el la postlasaĵo de la usonano d-ro Max Talmey, okulisto kaj aŭtoro de diversaj publikaĵoj pri matematikaj kaj fizikaj problemoj, en kiuj li ankaŭ klopodis popularigi la relativec-teorion. Ĝis 1909 Talmey estis esperantisto. Li poste transiris al Ido. Ekde 1925 li publikigis eseojn pri sia projekto "Arulo" (foje ankaŭ kun la nomo "Ilo" aŭ "Gloro"), kiu estas tre proksima al Ido. Talmey konis Einstein el la tempo de komuna frekvento de la sama gimnazio. Ili korespondis. En letero de 17.3.1933 (Novjorko) Einstein reagis al ricevita priplanlingvaj eseoj de Talmey: "Mi legis kun multe da intereso viajn publikaĵojn pri internacia aŭ pli bone racia helplingvo. Mi estas konvinkita, ke la publikigo de via libro pri tiu temo estus tre dezirinda kaj trovas grandan intereson ĉe tiuj, kiuj estas proksimaj al la problemoj. Mi sentas la bezonon tion komuniki al vi tuj nun; alian

Omaĝo al oficeja jubileo

La Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 26-an de novembro, omaĝis la 50-an datrevenon de la translokiĝo de la sidejo de UEA al Roterdamo. Ekde novembro 1955 la CO troviĝas en la nederlanda metropolo, kies animon "ornamas filozofia saĝo, aŭdaca praktikemo kaj senfina kuraĝo", kiel Ivo Lapenna skribis en la revuo *Esperanto*, anoncanta la ekfunkcion de la asocia centro en la nova loko.

Kun la unua, Geneva epoko de la sidejo, la publiko konatiĝis per la prelego de historiisto Ziko Sikosek pri la tiam direktoro Hans Jakob. Poste Johano Rapley, la lasta gvidanto de la oficejo en la apud-Londona vilaĝo Heronsgate, prilumis tiun mezan periodon de la Centra Oficejo. En formo de intervjuo, kiun gvidis Sikosek, prezentis siajn rememorojn Glauco Pompilio, iama KKS, kiu komencis sian ofician servon en la unua, luita domo de UEA en Roterdamo, kaj Victor Sadler, kiu laboris en la nuna domo de la jardekojn kiel redaktoro, oficeja direktoro kaj ĝenerala direktoro.

En la antaŭa tago ekstreme aĉa vetero atakis Nederlondon kaj paneigis la trafikon sur fervojoj kaj aŭtoŝoseoj. En la sabato de la Malferma Tago kelkaj fervojlinioj estis ankoraŭ rompitaĵaj kaj partoj de la lando plu restis sen elektro. Malgraŭ la malfavoraj kondiĉoj la laborantoj de la CO havis cent vizitantojn el 12 landoj. La ĉefgasto estis la prezidanto de UEA, Renato Corsetti, kiu

vigle diskutis kun aŭskultantoj pri la taskoj kaj defioj, kiujn aktuale frontas UEA. Novaĵo en la programo estis la ludo-tago de Nederlanda Esperanto-



Glauco Pompilio kaj Ziko Sikosek

junularo, kiu ebligis pasigi tempon per diversaj tabloludoj.

Sukcesa estis la tago por la Libroservo de UEA, kiu vendis librojn kaj aliajn varojn por 2522 eŭroj. Denove la plej furora verko estis *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris

Kolker, kiun akiris 10 vizitantoj. Ĝin sekvis, kun po 9 ekzempleroj, la plej novaj eldonaĵoj de UEA, lanĉitaj en tiu ĉi Malferma Tago: *Etimologia vortaro de la propraj nomoj* de André Cherpillod kaj *Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj*, libreto kun la prelego de Marjorie Boulton en la Malferma Tago en novembro 2004. En 6 ekz. vendiĝis la utopia novelo *Klaŭstrario* de István Bejczy, kies



tradukinto István Ertl mem prezentis la libron. De *Taglibro de mia frato* (C. Pressburgen), *Historio de Esperanto* (A. Korĵenkov) kaj *La unufoja lando* (T. Venclova) estis venditaj po 5 ekz.

Dum la tuta Malferma Tago laboris kun siaj kameraoj Petro Baláž kaj Francisko Veuthey, kiuj registris scenojn de la tago por dokumenta filmo. La filmo prezentos ankaŭ la vivon de la Centra Oficejo. Oni antaŭvidas lanĉi ĝin en aprilo. (GaKo)

Sep bibliotekoj ricevis Thorsen-apogon



La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn al sep Esperanto-bibliotekoj el la rimedoj de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.

UEA disdonas ĉiujare ekde 1997 subvenciojn el la monsumo, kiun la konata dana esperantista paro donacis por pliriĉigi la kolektojn de bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco.

En 2005 disponeblis 1000 eŭroj. Al **Slovakia Esperanto-Biblioteko** oni asignis librojn je la valoro de 80 eŭroj. **Triesta Esperanto-Asocio** (Italio), **Kultura Centro de Esperanto** (Campinas, Brazilo) kaj **Fonduso**

Cesar Vanbiervliet (Kortrijk, Belgio) ricevis po 100 eŭrojn. **Provinca Filio Havano** de Kuba Esperanto-Asocio ricevis 195 eŭrojn kaj **Esperanto-Societo "Cele-kula"** (Niš, Serbio) 200 eŭrojn. La plej grandan subvenciojn, 225 eŭrojn, ricevis **Hubei-a Esperanto-Asocio** (Ĉinio).

Petoj pri subvencioj en 2006 devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de oktobro. Kun la peto necesas sendi liston de dezirataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

La unua eŭropa forumo pri plurlingvismo

La 24-an kaj 25-an de novembro 2005 okazis en Parizo, en prestiĝaj lokoj kiel la Supera Porinstruista Altlernejo kaj la Senatejo en Palaco Luxembourg, la forumo nomata *Premières Assises européennes du Plurilinguisme*, t.e. la unua eŭropa forumo pri plurlingvismo.

Organizis ĝin ASIEDIFRES, asocio por progresigi la eŭropan identecon, kaj kelkaj partneraj asocioj. La celo estis kunvenigi diversajn respondeculojn el la politika, administra, ekonomia, pedagogia kaj lingvika medioj por priprakti la temon *Kulturaj lingvoj, komunikaj lingvoj: defio de tutmondiĝo*.

Unueco en diverseco estas la devizo de Eŭropa Unio. Plurlingvismo kaj respekto al la kultura diverseco estas nepraj kondiĉoj por aktiva eŭropa civitaneco. Kontraŭ la monopolo de unusola komunika lingvo necesas subteni plurlingvismon bazitan sur "kulturaj lingvoj". Pri tiaj aferoj oni debatis ankaŭ dum la ĵusa NITOB-simpomio, do la temoj ne sonis fremde al esperantistaj oreloj.

Kiam antaŭ pluraj monatoj ASIEDIFRES lanĉis alvokon por kontribuoj al tiu forumo, pluraj esperantistoj proponis prelegon, kie ili klare menciis Esperanton en la resumo de sia kontribuo. Ĉiuj estis rifuzitaj. Tamen eblis ĉeesti kiel simpla partoprenanto, kaj inter la ĉ. 200 aliĝintoj estis pluraj esperantistoj. C. Nourmont aliĝis nome de UEA, pluraj nome de E-D-E (Eŭropo - Demokratio - Esperanto), partio kiu prezentigis ĉe la eŭropaj balotoj en Francio, kaj kelkaj individue.

La temo estis traktita laŭ tri subtemaroj, debatitaj en apartaj atelieroj:

- plurlingvismo en ties ekonomia kaj kultura dimensio
- lernado de lingvoj dum la tuta vivo
- lingvoj en la internaciaj rilatoj.

La enkonduka prezento enhavis la kutimajn forviŝojn de artefaritaj lingvoj, sensukcesaj, senkulturaj... Inter la podianoj de la inaŭgura sesio sidis Robert Phillipson kaj Charles Durand.

La surprizo venis de Charles Durand. La invitintoj certe atendis de la direktoro de Franca Instituto pri Informadiko en Hanojo, ke li parolos je la gloro de franca lingvo. Lia kontribuo en alia sesio estis pri *Scienco pagas imposton pro la unulingveco* – pri kio li pli-malpli intervenis en la NITOB-simpomio ĉi-somera. Sed Charles Durand tuj anoncis ke li parolos en sia propra nomo, do tute ne en la nomo de sia Instituto. Kaj kio estis la konkluda parto de lia prelego? Ke fronte al tiuj lingvaj problemoj, ekzistas lingvo facila, kun simpla gramatiko, kiu funkcias jam de jardekoj... Mi precizigu la ĉefan aferon: li parolis dum pluraj minutoj pri tiu lingvo, sen nomi ĝin. Li sciis ke ĝi estas tabua vorto.

La posta preleganto kompreneble tuj prononcis la tabuan vorton, kun kelkaj malestimaj komentoj.

Plej interesa por la esperantistoj estis evidente la tria temo.

Mi ĉeestis la atelieron kie estis prelegontaj i.a. Sean Ó Riain, R. Phillipson, K. Gawlitta, do subtenantoj de Esperanto. En la publiko ĉeestis 4 aŭ 5 aliaj esperantistoj. Konsiderante, ke estis apenaŭ

kvardeko da homoj en la salono, estis forta proporcio de esperantistoj kaj simpatiantoj.

Post prelego de S. Ó Riain, la kunvenestrino komentis: ni ne volis paroli pri Esperanto kiam ni preparis la kunvenojn, sed en tia formo, kiel vi prezentas la aferon, ĝi estas tute akceptebla kaj interesa.

Iuj esperantistoj intervenis en eble tro pasia maniero post la prelego de Sean Ó Riain, sed fine ili pravis. La reagoj ne estis malpli pasiaj flanko de la neesperantistoj. Verŝajne ĝi estis la plej vigla debato de la tuta Kunsidaro. Fine estis komento de iuj: Ni havas nenion kontraŭ Esperanto, sed kiu rilato kun plurlingvismo? En tiu ĉi forumo, kiu pristudas multlingvecon ĝenerale, kial oni dediĉus pli da tempo al promocio de Esperanto ol al promocio de la franca aŭ tiu ajn specifa lingvo? Kiel unu plia lingvo solvas problemon de multlingveco, kaj kiam da tempo necesus por ekakceptigi al niaj politikistoj la ideon de Esperanto? Mankis bedaŭrinde la tempo por pli ĝisfunde debati kaj klarigi tion.

Ĉe la fina dokumento kaj konkludoj, la raportanto Marianne Lederer ja menciis la vigan pasian debaton pri Esperanto... Ankaŭ la plendojn, ke interne de iuj eŭropaj institucioj oni ne respektas la egalecon de lingvoj: dunganoncoj estas por *English native speakers* (denaskaj anglalingvanoj). Sed plej grave, estis akceptita la propono el la prelego de S. Ó Riain, fari eksperimentojn pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

Dum la reprezentanto de la franca ministro pri kulturo kaj komunikado diris la kutimajn ŝablonajn vortojn pri la streboj de Francio al plurlingvismo, bela teorio ne aplikata, estis tre interesa interveno de franca deputito el Polinezio, kiu raportis, ke nun oni reenkondukis la lokajn polineziajn lingvojn, por ke la infanoj tie retrovu sian kulturen identecon kaj tiel pli bone lernu la francan lingvon, anstataŭ fuŝparoli en la familio fremdan lingvon.

Lasta surprizo venis, kiam parolis la delegito de CFTC (sindikato de

kristanaj laboristoj) Jean-Loup Cuisiniez. Vigle, tre aŭskultate, plej aŭskultate, ĉar li ne parolis en akademia pompa stilo, sed en vera, vereca, vigla stilo, pri la longdaŭra subfosa konkerado de la angla lingvo en Francio. Li parolis ankaŭ pri la proceso de la dungitoj de la entrepreno GEMS (General Electric Medical System) kontraŭ sia firmao, kies laborlingvo estas nur la angla. Ili plendis pro devigo, ke ĉiuj instrukcioj, internaj notoj... eĉ interfrangvaj dungitoj estu en la angla, kaj ili gajnis, sed la firmao apelaciis, kaj estos denove proceso la 26-an de januaro 2006. Kaj, jen la ĉerizo sur la kuko, li menciis, ke la sindikato subtenis la dungitojn, kaj ke ili estis helpataj de la Esperanto-Movado en la manifestacioj. Do certe Esperanto faris tie etan paŝon al plena agnosko.

C. Nourmont

fojon, se mi havos pli da trankvilo, mi volonte skribos al vi pri aliaj aferoj, ankaŭ pri personaj".

La planita libro de Talmey pri internacia lingvo, al kiu aludas Einstein, ŝajne neniam aperis. Almenaŭ mi ne trovis koncernajn bibliografiajn informojn.

Konklude

Ŝajnas, ke Einstein ne povis esti tiom kontraŭ la ideo de internacia lingvo (aŭ, kiel li skribas "racia" lingvo), kiom li asertas en la citita letero al Solzbacher. Post la transpreno de la honora prezidanteo por la SAT-kongreso en Kassel (1923) la mondfamulo eble tro ofte estis petita de esperantistoj sin esprimi favore. Tio povas havi nur negativan efikon. Tamen hejme oni parolis pri la lingvo. Ankaŭ la riproĉo pro Anglio certe ne plaĉis al li, do li volis esti pli singardema. Tamen li ja pozitive reagis al la publikaĵoj de sia kungimnaziano. Ĉu nur pro ĝentileco? Restas demandoj.

Detlev Blanke

La Esperantomuzeo en Vieno en nova vesto



Herbert Mayer

Ekde la unua de decembro 2005 du gravaj ŝtataj Esperanto-institucioj ree estas alireblaj por la publiko: la **Esperantomuzeo** kaj la **Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko** en Vieno. En Herrengasse 9, tute en la centro de la urbo, inter la Ministerio por Internaj Aferoj kaj la Ministerio por Eksteraj Aferoj, situas la nove adaptita Palaco Mollard, en kiu ekloĝis kvar sekcioj de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Kaj tie la Esperantomuzeo trovis sian novan hejmon kune kun la tutmonde fame konata Kolekto por Muziko kaj la unika Muzeo de Tergloboj.

La lastaj dek jaroj estis krizaj por la Esperanto-movado. La politikaj ŝanĝoj alportis novajn sociajn strukturojn, kiuj certgrade estas malpli favoraj por nia lingvo. Ne malmultaj grandaj Esperanto-asocioj kaj entreprenoj suferis reduktion de sia aktivado.

La jaroj ĉirkaŭ 2000 estis tre danĝeraj por la Esperantomuzeo. Fakte oni ne bezonis timi pri la biblioteka havaĵo, ĉar ĝi estas ja en la posedo de la Aŭstria Biblioteko kaj kiel tia neniel forigebla. Firmaj leĝoj proktektas niajn objektojn. Sed jes, oni devis timi pri la memstareco de nia instituto. Sed ni elturniĝis el tiu kriza situacio fortaj kiel neniam antaŭe. Ni atingis la maksimumon de la atingeblo, deklaras Herbert Mayer, la direktoro de la Muzeo.

Sur 90 m² la nova Esperantomuzeo montras sin tute hodiaŭa: apud tradiciaj vitrinaj funkcias ses komputilaj instalaĵoj kaj prezentas diversaspekte la Internacian Lingvon. Per ludaŭtomato ekzemple la vizitantoj povas facile lerni la bazajn gramatikajn principojn de Esperanto. Ke arta lingvokreado ne nur koncernas Esperanton, sed ankaŭ naciajn lingvojn, montras komputila instalaĵo per ekzemploj de artefaritaj vortoj el la germana kaj la angla lingvoj. Filmo donas informon pri la historio de Esperanto. Konciza, sed facile komprenebla enkonduko rakontas al la publiko la fascinajn aspektojn de la propedeŭtika valoro de Esperanto, kiujn pruvis multjaraj eksperimentoj de la Kibernetika Instituto de la Universitato de Paderborn.

Unu komputila instalaĵo estas preskaŭ komplete dediĉita al UEA: Speciala programo montras la praktikan aspekton de nia lingvo: sur ekrano movebla mondomapo peras ideon pri la funkcio de la Pasporta Servo, de la delegita reto de UEA kaj de ties organiza laboro, de la Universalaj kongresoj. Tiuj iloj de moderna muzeoteknologio kombiniĝas kun tradiciaj vitrinaj, kiuj prezentas per libroj, manuskriptoj, fotoj, muzeaj objektoj kaj insignoj la historion de Esperanto kiel fenomenon firme ligitan al la kultura kaj politika historio de la homaro: jen la unua libro de Esperanto, mane pentritaj kaj skribitaj gazetoj el la militkaptitejoj ĉirkaŭ 1919 kaj la manuskripto de la sekretario de Tolstoj, Victor Lebrun.

La Aŭstria Nacia Biblioteko investis kelkcentmil eŭrojn por doni al la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj tute modernan hejmon. Tio estas por ni instigo prezenti en serio tiujn unikajn institutojn, kiuj gardas la kulture heredon de Esperanto kaj prezentas ĝin al internacia publiko.

Ofta, sed ne tre konata fenomeno ekster Esperantujo: Esperanto-vortoj ne malofte servas kiel produktonomoj: *Amo, Skribo, Mirinda, Movado, Rado...* Tuta vitrino estas dediĉita al tiaj produktoj kaj peras al la vizitantoj la scion, ke la lingvo Esperanto estas tiel bela, ke ĝi funkcias kiel fonto por vastekonataj kaj efektivaj komercobjektoj.

Kaj buntaj afiŝoj historiaj, sed ankaŭ kelkaj aktualaj peras belan optikan impreson de la muzeo.

Krom la ampleksigo de la prezentita temaro, la muzeo ofertas plian servon: Ĝi estos ekde nun vizitebla ankaŭ sabate, funkcie dum la sekvaj tagoj:

Lunde, merkrede, marde, vendrede, sabate 10h00 – 14h00, ĵaŭde 15h00 – 19h00.



La Esperantomuzeo trovis sian novan hejmon en la Palaco Mollard, sur la strato Herrengasse 9, en la centro de Vieno.

Loke - fake - Persone



☛ **BRAZILIO:** La 18-an de septembro Taguatinga Esperanto-Klubo en Brazilo okazigis la 8-an Esperanto-Renkontiĝon de Taguatinga, kun la rekorda ĉeesto de 205 homoj. La ĉeftemo de la renkontiĝo estis: *Esperanto en la mondo*. Dum la unutaga evento okazis prezentado de la filmo *Esperanto - respekto en ĉiuj lingvoj* de la brazila ĵurnalistino Eduardo Garces, prelego pri la ĉeftemo fare de Lício de Almeida Castro, eksprezidanto de Esperanto-Asocio de Brazilo kaj de Brazilo Esperanto-Ligo, arta spektaklo fare de profesiaj kaj amatoraj artistoj, teatra ensemblo de Lernejo Lazaro Ludoviko Zamenhof prezentis la teatraĵeton "La muŝo", kantistino Flávia Fonseca kaj aliaj. La renkontiĝo ĉeestis ŝtataj aŭtoritatoj – deputito Izalci Lucas, ŝtata Sekretario pri Scienco kaj Teknologio de la Registaro de Lernejo Pires de Araŭjo, Administranto de la Regiono Taguatinga. (Carlos Maria)

☛ **ĈINIO:** En la Fakultato pri Internacia Turismo de Ĉina Universitato de Administrado kaj Softvaro en Pekino komenciĝis la 17-an de septembro 2005 Esperanto-kurso. Por pli ol cent studentoj ĝin gvidas s-ro Cui Jiayou. S-ino Lordanka el Anglio, s-ro Elvis el Niĝerio kaj du ĉinaj samideanoj vizitis la kurson kaj faris paroladon pri lernado kaj aplikado de Esperanto. Kontaktu ilin: cuijiayou@yahoo.com.cn.



☛ **SERBIO KAJ MONTENEGRO:** En Kragujevac Saša Pilipović organizis Esperantan vesperon en Biblioteko. Ĝin ĉeestis Tereza Kapista, Ĉseh-metoda instruisto, kiu parolis pri sia instruado en Afriko. Saša Pilipović kaj Slavica Radulović parolis pri siaj aktoriaj laboroj. Saša jam aktoris en sep kongresoj. Slavica aparte parolis pri siaj impresoj dum la Litova UK. Ŝi estis profunde kortuŝita pro la internacia etoso. Post la renkontiĝo en la biblioteko de Kragujevac la urba televido montris kelkajn segmentojn pri la vespero, sekve de kio multaj telefonis al la redakcio kaj petis pliajn informojn pri Esperanto. Post du tagoj okazis unuhora televida elsendo pri Esperanto. Dum tiu elsendo la organizantoj menciis ke Esperanton eblas lerni ankaŭ en Kragujevac. Post kvar tagoj aliĝis dek kvin personoj al la kurso. La kurso intertempe finiĝis kaj Tereza ĝojas, ĉar la kursanoj estas plejparte studentoj. Dek el ili jam aliĝis al la SAT-kongreso, kiu okazos en Beograd en aŭgusto 2006. La prelego pri Afriko instigis la homojn ke ili voku Tereza instrui ankaŭ en la propra lando. Dank' al afrikanoj do en Kragujevac estas dek kvin nova junaj esperantistoj. (D.J.)



☛ **KATALUNIO:** De la 16-a ĝis la 18-a de septembro (vendredo ĝis dimanĉo) okazis la t.n. Esperanto-Tagoj de Barcelono. La tradicia renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Asocio fariĝis 80-homa kongreseto, danke al la impeto de Kataluna Esperanto-Junularo. La Esperanto-Tagoj sekvis la strukturon de la marta renkontiĝo en Mataró: ili estis senpagaj kaj malfermitaj al la publiko. Sabate, kiam disvolviĝis la kerno de la programo, okazis tri samtempaj aranĝoj planitaj por tri malsamaj lingvoniveloj: plenaj komencantoj, progresantoj kaj fluaj parolantoj. Partoprenis homoj ĉiuaĝaj, de 17 ĝis 71 jaroj; el la tuta kataluna landaro kaj eksterlandanoj el sep malsamaj naciecoj; delongaj esperantistoj, memlernantoj por la unua fojo aŭdintaj Esperanton, mezlernejoj verkantaj klas-

laboraĵojn pri Esperanto kaj scivolemuloj. La aranĝo pruvis, ke la marta sukceso ne estis mirindaĵo, sed ke la okulfrapa kresko havas solidan grundon post plurjara laboro. Novaj homoj serioze ekaktivis: dum la aranĝo okazis ne nur dudeko da kursoj, prelegoj, diskutoj kaj du ekskursoj, sed estis tempo ankaŭ por renkontiĝo de liberecantoj, kunveno de valenciaj aktivuloj, ateliero por novaj *Indymedia*-tradukantoj kaj asembleo de KEJ, kie nova estraro estis elektita. Pri la renkontiĝo aperis informo en la kvartala gazeto kaj aktivuloj estis intervjuataj dum kvaronhoro en radio.

Hektor Alos i Font



OSIEK-PREMIO 2005

En 2005 la Osiek-anoj proponis 26 verkojn premiindajn; ĉiuj estis prezentitaj en la juna numero de *La Gazeto*. La 15an de julio 2005, dum la IEK en Rafina, Grekio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Christian DECLERCK



pro
"Tarokoj kaj epokoj"
Gratulon!

La premio, 600 €, rekompensas vivantan aŭtoron pro publikigita verko ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro

Informoj: *La Gazeto* 55210 Creuŝ. Francio <http://osiek.org>

☛ **ĈEĤIO:** En la stud-programo de la Pedagogia fakultato de Universitato Masaryk en Brno estas inter la elekteleblaj studobjektoj ankaŭ Kleriga kibernetiko, instruata esperantlingve. Por la ĉi-aŭtuna semestro registriĝis en ĝi 18 studentoj. Kiu ne konas Esperanton, povas lerni ĝin ĉe alia elektelebla studobjekto de la Pedagogia fakultato, en kiu nun registriĝis 38 studentoj de diversaj fakultatoj. Kunlaboro kun eksterlandaj universitatoj, kie estas instruata Esperanto, povus komenciĝi en 2006 en Somera Esperanto-Tendaro en Lančov. (Ing. J. Vojáček)

☛ **SENEGALIO:** Alphonse Diatta, prezidanto de Senegala Esperanta Asocio (S.E.A.), serĉas kontaktojn kun Esperanto-asocioj en Orienta Eŭropo. Li partoprenis sian unuan Universalan Kongreson en Varsovio en 1987 kaj estis ankaŭ en Budapeŝto kaj Zagrebo. Li ĝojatendas bonajn amikecajn rilatojn kun Esperanto-asocioj. Adreso: S-ro Alphonse Diatta, B.P. 21231 Dakar-Ponty, SN-Dakar, Senegalio/Sénégal.

☛ **KROATIO:** Zagrebaj esperantistoj festis la ĉi-jaran tagon de la Esperanta libro la 7-an de decembro en la librovendejo Profil, prezentante al la zagreba publiko "La Zamenhof-straton" de Roman Dobrzyński. La urbestro de Zagrebo Milan Bandić ĉeestis la feston kun la estro de la zagreba kulturfako Pavle Kalinić. (La urbestro alvenis post kiam Kroata Esperanto-Ligo sendis al li la konceman kroatan libron kun la informo pri tradukoj de la libro plurlingven kaj kun la invitilo

por la librolanĉo. La libro estis sendita ankaŭ al pluraj politikistoj. La prezidento de Kroatio Stjepan Mesić dankis letere pro la donacita *La Zamenhof-strato*. Pri la lanĉita libro parolis la eldonisto Damir Mikulić kaj la tradukisto Domagoj Vidović. Fragmentojn el la verko legis Vida Jerman. Spomenka Stimec prezentis la tutan projekton pri la tradukado de *La Zamenhof-strato* en aliajn lingvojn. Estis ekspoziciaj la japana, litova, pola, Esperanta, kroata kaj ĉeĥa eldonoj. Anoncita estis la slovena eldono, kiu aperos en Maribor kaj la slovakaj eldono, kiu aperos en Martin. Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj anoncis ke la kroata traduko de la libro aperos en 2006 en surbendigitaj formo en la eldonejo por surbendigitaj libroj ĉe la Blindulasocio. Estis menciite ke oni tradukas la libron krome en la portugalan, la latvan kaj la estonan kaj ke la hungara traduko serĉas sian eldoniston. Estas preparata ankaŭ franca traduko. Kroata televido filmis pri la evento, aparte interesigante pri la personeco de la nepo Zamenhof. Familia radio elsendis pri ĝi. La ĉi-jaran zagreban Zamenhof-tagan feston partoprenis 60 ĉeestantoj, inkluzive reprezentantojn de la Pola Ambasadejo en Zagrebo, al kiuj estis donacita pola ekzemplero de la libro. S. Stimec

☛ **KOREIO:** La biografio de L.L. Zamenhof estas elektita kiel "Rekomendinda libro al junuloj por 2005". Korea Eldonkulturo-Asocio kaj Korea Eldonkulturo-Evoluiga Fondaĵo kune elektis la libron *La Homo kiu defiiis Babelon* (Korea-lingva versio), de



René Centassi kaj Henri Masson, tradukitan de Korea Esperanto-Asocio, kaj eldonitan en oktobro 2005 de Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj. Korea Eldonkulturo-Asocio estas oficiala asocio de ĉiuj eldonejoj en Koreio. Entute estis elektitaj 33 libroj, rekomendindaj al junuloj. Inter ili estas 4 libroj pri socikulturo, kaj *La Homo kiu defiiis Babelon* estas unu el ili. La elekto signifas, ke la libro povas havi sur sia kovrilo la markon de rekomendinda libro, kaj ĉiuj universitatoj kaj publikaj bibliotekoj devas ĝin aĉeti.

☛ **ĈINIO:** Ĉina Esperanto-Ligo fondis Turisman Fakon por akcepti esperantistojn kaj amikojn el diversaj landoj de la mondo. La Turisma Fako povas helpi rezervi hotelon, flughotelojn, al laŭnavigi ekskursojn. Interesigantoj pri la historio, kulturo, manĝaĵoj kaj aliaj aferoj en Ĉinio povas kontaktiĝi kun S-ro Shi Guang, oficisto de la Turisma Fako. Li povas helpi al esperantistoj ĝui agrablajn tagojn en Ĉinio. Krome, la Turisma Fako esperas kunlabori kun turismaj servoj de diversaj landoj. Retpoŝto: celturismo@163.com, celturismo@sina.com.

☛ **TAJVANO:** Kadre de la ekster-kursara agado ekde la pasinta septembro ekzistas Esperanto-kurso en la mezalta lernejo, kie Reza Kheir-khah instruas la anglan. La lernejo nomata *Ping Rong High School* estas unu el la plej grandaj en sudo de Tajvano kun ĉirkaŭ 3000 studentoj. Pasintjare la kurso havis 14 studentojn, el kiuj nur 4 finis la kurson. Ĉi-jare 24 aliĝis al la kurso kaj ili estas pli bonaj studentoj, se konsideri ilian fakon kaj ankaŭ la nivelon de la kono de fremdaj lingvoj. La aĝo de la studentoj estas 15-17 jaroj. La grupo bonvenigas interklubajn kaj interlerneajn kontaktojn: Rezamenhof@yahoo.com.



Modelo de profesieco kaj amo

Ilustrita frazeologio. Sabine Fiedler. Ilustris Pavel Rak. Dobřichovice: KAVA-PECH. 2004. 136p. 21 cm. ISBN 8085853574. Prezo: € 12,90

Ni ne havis ĝis nun en Esperantujo ĉi-specan popularan verkon: frazeologiaĵoj (parolturnoj, proverboj ktp) ilustritaj per plaĉaj kaj spritaj desegnoj. La libro aspektas jene: sur ĉiu paro da paĝoj aperas maldekstre po unu proverbo aŭ parolturno kun du-tri ekzemplaj citaĵoj el revuoj aŭ libroj por aŭtoritativigi ĝin; dekstre aperas granda humura desegno kaj ekvivalentaj esprimoj en tri-kvar aliaj lingvoj, ne ĉiam la samaj, tamen preskaŭ ĉiam eŭropaj. Estus tre interese plivastigi la lingvoliston por eventuala dua eldono.

Mi trovas ĉi libron facile vendebla, kaj ĝi eble helpas klerigi la neklariĝeman esperantistaron (des pli bone). Veraj interesatoj pri frazeologio prefere sin turnu rekte al la ĉiam aminda *Proverbaro Esperanta* de Zamenhof, al la same aminda *Faktoj kaj Fantazioj* de Boulton – kies disaj proverboj ĉarmas kaj elegantas – kaj akcesore ankaŭ al la ekzemplo-frazoj de PIV. Survoje kaj enkonduke situas *Ilustrita frazeologio* de Fiedler, kiu ja povus vekti intereson pri frazeologio ĉe kelkaj komencantoj kaj progresintoj.

Mi ja rekomendas ĉi libron: tre bonvenas la alfabeto ordo laŭ la ĉefa substantivo kaj ankaŭ la indekso en la komenco. Mi tre ŝatas, ke la aŭtorino regule mencias eventualan aperon en *Proverbaro Esperanta* kaj en PIV. Ĝi ĉiam mencias ankaŭ fontojn, kvankam bedaŭrinde ili ne ĉiam estas personaj sed foje nur revuaj sen plia klarigo: koni la nacianecon aŭ la gepatran lingvon de fraz-aŭtoro ja tre helpus spuri eblan nacilingvan paŭson. Tre ŝatindas ankaŭ la aperigo de kelkaj pure Esperantaj parolturnoj, nome *Iri glite kaj glate* (p. 46), *Kredu min, sinjorino* (p. 114) kaj *Jam temp' está* (p. 128).

Foje aperas parolturnoj, kiuj ne fidele sekvas la vortumon en la *Proverbaro Esperanta*. Ekzemple, Fiedler proponas *Sinki en forgeson* (p. 36) anst. la Proverbaran *Formeti la aferon en la koston de forgeso; Al iu hirtiĝas la haroj* (p. 40) anstataŭ la Proverbaran *La haroj streĉiĝas kaj Elverŝi sian koron* (Zamenhofa esprimo, p. 62) anstataŭ la Proverbaran *Malkovri antaŭ iu sian koron*. Eble la aŭtorino faris tion ĉar: (a) ŝi volis fidele speguli la

veran uzadon de la frazeologiaĵoj; (b) ŝi adaptetis por la nacilingvaj tradukoj, aŭ (c) ŝi ne reale registris la Proverbaran formon en la fakte uzata Esperanto.

Kompreneble ne ĉio en la libro runde perfektas. Fiedler parolas en la enkonduko pri la influo de la gepatra lingvo kaj ekzemplas per la Proverbara *Unu hirundo printempon ne alportas*, kiu buŝe de esperantistoj povas fariĝi *Unu hirundo printempon ne faras aŭ Unu hirundo ne sufiĉas por anonci la printempon*. Laŭ mi – kaj ŝajne ankaŭ por la aŭtorino – tiaj paŭsoj estas nerekomendindaj... Sed sur p. 44 Fiedler proponas kiel samrangan varianton *Unu hirundo ne faras someron*, kiu

ja estas denove simpla paŭso de la eŭropaj lingvoj... (Parenteze, ankaŭ la aŭtorino montras gepatralingvan influon en sia enkonduko, ekz. *traduk-transprenaĵoj* anst. *paŭsoj*, *fremdlingvojn* anst. *fremdajn lingvojn* aŭ *inter alie* anstataŭ *interalie*).

Mi same ne komprenas kial sur p. 110 (el *sango kaj karno*) la aŭtorino rimarkas, ke *pro etnolingvaj influoj* oni trovas ankaŭ *el karno kaj sango*. En mia gepatra lingvo oni uzas neniu el ambaŭ: Ĉu mi devas do dedukti, ke *el sango kaj karno* pli bonas ol *el karno kaj sango*? En la du sekvaj ekzemplaj frazoj aperas ambaŭ formoj; bedaŭrinde, la du aŭtoritativaj fontoj en la paĝo estas senaŭtoraj (*La Gazeto* 63 kaj *Fonto* 244), kaj

ni do ne povas scii, ĉu estas frazoj de imitindaj bonaj aŭtoroj aŭ de sinjoro Ajnulo ĵus lerninta Esperanton. Necesas nur konsulti en PIV 2 la vortojn *sango kaj karno* por trovi kvin Zamenhofajn esprimojn kun la sinsekvo *karno-sango*: *ricevi karnon kaj sangon; ŝia infano, ŝia propra karno kaj sango; mi ne plu deziros, ke vi (pupoj) ricevu karnon kaj sangon; ne karno kaj sango, sed la koro faras nin patroj kaj filoj; vi estas lia karno, lia sango*. Ĉu eble ankaŭ Zamenhof uzis tian ordon pro etnolingvaj influoj?

Tiuj makuletoj tamen ne malplivalorigas la libron, kiu – enhave, bilde, preseje – estas modelo de profesieco kaj amo al nia lingvo. Dankon, Fiedler! Antonio Valén



Nova sekretario por la CO



La posteno de oficeja sekretario en la Centra Oficejo de UEA restis vaka post la emeritiĝo de s-ino Atie van Zeist en majo ĉi-jare.

Intertempe la Ĝenerala Direktoro de UEA dungis por tiu posteno s-ron Ralph Schmeits, kiu eklaboris la 1-an de novembro. S-ro Schmeits estas 26-jara aktivulo de Nederlanda Esperanto-Junularo. Kun unujara kontrakto li deĵoros kvar tagojn semajne. S-ino van Zeist plu helpas pri sekretariaj taskoj kiel volontulo unu tagon semajne.

Ne nur-angla Eŭropo

Une langue pour l'Europe? Mais oui! Pour sauver les langues de l'Europe. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2003. 79p. 21 cm. ISBN 2906134643. Prezo: € 4,50

Jam en 1995 A. Cherpillod verkis rimarkindan broŝuron, *Esperanto ou Babel*, kiu estas, laŭ mi, la plej valoro, konvinka kaj trafa enkonduko al Espranto por scivolema persono, kiu deziras informiĝi.

Efektive, ĉu al amiko, ĉu dum ekspozicio, antaŭ budo, al vizitanto, kion proponi al neesperantisto kiel enkondukon al la lingva problemoj kaj al Esperanto? 1. Al specialisto, kiu disponas sufiĉe da tempo, intereso kaj mono: *Le défi des langues* de Claude Piron, pro du kaŭzoj: la dikeco de la libro kaj ties prezo.

Sed oni absolute bezonas materialon facile legeblan kaj aĉeteblan: 2. *Esperanto ou Babel* tute respondas al tiuj ĉi kriterioj. Plie, se oni bezonas prezenti Esperanton al

neesperantista publiko, oni povas uzi la tekston de *Espéranto ou Babel* kiel tute pretan tekston de tre bona kaj konvinka prelego. Krome, ĝi tute taŭgas por vendo, ĉe budo, en kermeso aŭ ekspozicio. 3. *Une langue pour l'Europe* situas meze inter la du ĉi-supraj kaj uzeblas diversele: a. Por la posedanto mem, kiel tre kompleta kaj trafa argumentaro, en kiu svarmas faktoj, ekzemploj, statistikoj. b. Por pruntedoni al persono, kiu eventuale legus iom pli longan tekston ol *Espéranto ou Babel*. c. Por donaci al publika biblioteko aŭ al klubo.

Ĉiu esperantisto trovos sur ĝiaj paĝoj ne nur ĉiujn argumentojn por Esperanto, sed ankaŭ ĉiujn nerefeblajn faktojn por pravigi ilin. Jen la ĉefaj ĉapitroj: 1. Aktuala situacio:



katastrofo! 2. La mensogaj asertoj de la oficiala propagando. 3. Kial la angla nek estas nek povas fariĝi internacia lingvo. 4. Aliaj neelblaj projektoj: latina, perkomputila tradukado... 5. La solvo: Esperanto. Kial? 6. Esperanto kaj verkistoj, filozofoj, lingvistoj (multnombraj citaĵoj). 7. Kial la estonteco?

Kiel oni povas konstati, tiu ĉi libro ne estas pledo por Esperanto, sed nerefutebla demonstracio de ĝiaj nepraj neceso kaj valoro kiel internacia lingvo.

Foliumente ĝin, vi malkovros amuzajn kaj signifoplenajn faktojn, ekz.: Kiel loki la akcenton en anglaj vortoj? Tute simple: sufiĉas lerni apliki 5 ĉefajn regulojn, 40 klasojn da esceptoj kaj 120 klasojn da esceptoj al esceptoj! (laŭ J. Wells) Aŭ, se iu

neanglalingvano pretendas ke la angla lingvo estas facila, tuj petu ties helpon por traduki du aŭ tri anglajn esprimojn tute ordinarnajn, sed kiujn vi ne komprenis. Ekz. *when he was done in* aŭ *I'm fed up*. Vi certe ĝuos la konfuzitan mienon de via "specialisto" pri la angla. Jen du ekzemploj inter mil, kiujn vi trovos en tiu ĉi interesa libro.

Do, ne hezitu. Eĉ se vi jam posedas *Le défi des langues* de C. Piron, akiru *Une langue pour l'Europe*. Sur ĝiaj 79 paĝoj vi trovos la ĝisdatigitan esencon de la 350-paĝa libro de Piron; vi povos pruntedoni ĝin, aŭ donaci ĝin al iu ajn, kiu interesiĝas pri Esperanto. Se vi deziras prezenti Esperanton al neesperantista publiko, kaj esti kapabla respondi al ĉiuj kritikoj kaj argumentoj, ne serĉu plu: ĉio troviĝas en tiu ĉi libro. Se vi konas la francan, akiru ĝin, tralegu ĝin kaj, se vi povas, traduku ĝin en vian lingvon (la aŭtoro permesas tion): ĝi vere meritas esti tradukita en aliajn lingvojn, kaj indas esti uzata por informado kaj propagando ĉie en la mondo.

Jean Marin

Aĉetenda, tre aĉetenda...

Manlibro pri instruado de Esperanto. Red. K. Kováts. Partizánske/Hago: Espero/ILEI, 2005 (2-a eld.). 150p. 21cm. ISBN 8096904264. Prezo: € 7,50

Ĉu el ni havas sian amatan ĉevaleton. Mi pensas, ke tiuj, kiuj uzas la reŭndamentan -io por landonomoj estas morale apenaŭ super la nivelo de De Beaufort kaj Blinkenberg. Stefan MacGill pensas, ke tiuj, kiuj ne opinias, ke la verbo estas ĉio en la frazo, ne komprenis ion ajn pri lingvo-instruado.

Stefan estas unu el la kontribuintoj al la recenzata libro. La aliaj estas multaj, sed tamen ne estas senutile rapide listigi ilin: A. Orellana Rojas, B. Dockhorn, D. Charters, H. Lundberg, I. Kocięba, K. Kováts, L. Szilvási, M. Molnár, P. Baláz, R. Petrović, V. Ivanov kaj Z. Tišljár. El tiu listo vi povas vidi kiom da malsamaj kompetentoj kuniĝis, por krei la libron, kio estis ebligita de la formo de malproksima kunlaborado pere de la komputila reto.

Male ol oni povus supozi, la multeco de aŭtoroj en redakte difinita kadro igas la libron pli valora, ĉar ĉiu aŭtoro verkas nur pri tio, kion li aŭ ŝi plej bone konas kaj plej profunde ŝatas.

Tiom, kiom mi povas juĝi, kaj pri la partoj pri kiuj mi havas ian fakan scion, ekzemple pri la lingvo-instruaj metodoj kaj ilia historia apero kaj malapero, mi trovis la materialon en la libro unuaranga. Same unuaranga ĝi ŝajnas al mi pri ĉiuj aliaj kampoj, kiujn ĝi pritraktas per mallongaj sed efikaj artikoletoj. Tio, kio

ofte detenis min de legado de pedagogiaj tekstoj, estas la parol-abunda stilo kun longaj frazoj en kiuj oni dubas ĉu la lingvo, kiun oni renkontas, estas la malnova greka aŭ Esperanto. Male ĉi tiu libro estas freŝe malsama kun mallongaj kaj fakt-abundaj tekstoj. Se vi volas scii, kiun metodon sekvi en difinita situacio, kiun ekzercon uzi, kiun ekzamenon celi por viaj lernantoj, la informoj estas tie. Temas pri speco de enciklopedieto pri instruado de Esperanto en 115 paĝoj, tre utila por niaj instruantoj, kiuj ne jam lernis lingvoinstruadon en normalaj naciaj lernejoj kadroj.

Ĉu kritikendaj partoj? Mi vere ne povas trovi ion tian. Mi povas nur iom ŝerci kun Stefan MacGill pri la graveco donata al transitiveco de verboj en Esperanto. Transitiveco ja estas problemo por homoj el almenaŭ kelkaj difinitaj gepatraj lingvoj, sed ne nepre kaj ne samgrade por ĉiuj, kiel supozigas la verko. Sed eble tio estas nur unu el miaj amataj ĉevaletoj. Konklude: aĉetenda, tre aĉetenda, se vi ne sukcesas elpresi ĝin el la reto, kiel supoze eblos, sed nur post iom da tempo.

Renato Corsetti



Ideala por ŝatantoj de mallongaj pecoj

Mi ne estas Mona Lisa. 'Sigmond Júlia. Berkey: Bero, 2001. 22cm. ISBN 1882251377. 64p. Prezo: € 9,90

Sigmond Júlia scias lerte kunmeti bonan frazon. Tion oni atendus; ŝi ja estas redaktoro de *Bazaro*, malgranda revuo eldonata de loka Esperanto-asocio en Rumanujo, sed kun neatendite vasta kaj internacia mondrigardo.

Ŝia libreto *Mi ne estas Mona Lisa* enhavas dek kvin tre zorge verkitaĵojn artikolojn kaj noveletojn. Temas pri etaj scenoj, tre delikataj observoj de homoj kaj situacioj kun perfekta elekto de vortoj kaj frazoj.

Por legantoj, kiuj ĝuas mallongajn pecojn, ĉi tiu libro estas ideala. Mi devas konfesi, tamen, ke mi mem preferus iom malpli da delikateco kaj iom pli da solida substanco. Estas kvazaŭ oni proponus pladon post plado da aube preparitaj antaŭmanĝetoj, sed iel neniam venus al la vera manĝo. La rezulto estus tre admirinda en si mem, sed finfine ne tute satiga. Multaj el la noveletoj en ĉi tiu kolekto estus tre bonaj scenetoj interne de pli longa verko, sed en si mem ne tute sufiĉas.

La kovrilo de Joel Brozovsky estas aparte menciinda; neniam antaŭe okazis, ke mi rigardis kovrilon de libro kaj tuj ridis.

Anna Löwenstein

Laste Aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimumume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Animo kaj penso. Poeme, epigrame. Bogusław Sobol. Toruń: Flamo, 2003. 54p. 21cm. ISBN 8391901203. Religiaj kaj pensigaj poemoj kaj epigramoj. € 4,50

Esperanto en Katalunio. 1987-1987. Antonio Marco Botella. Barcelona: Barcelona E-Centro, 2005. 358p. 20cm. ISBN 8493370010. € 22,50

Esperanto, un nouveau latin pour l'Église et pour l'humanité, L'. Ulrich Matthias. El la franca trad. div. Anvers: FEL, 2005. 286p. 20cm. ISBN 9071205975. Franglingva versio de *Esperanto – la nova latino de la eklezio*. € 11,40

Esperantologio / Esperanto Studies. Kajero 3. Red. Christer Kiselman. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 68p. 21cm. ISSN 13113496. Tri artikoloj en Esperanto kaj unu en la germana. € 7,50

Espero / Viltis. M.K. Ĉiurlionis / S. Nérís. Prezentado de Robertas Keturakis. El la litova trad. P. Čeliauskas, I. Tamošiūnienė. Kaunas: Varpas, 2005. Entute 32p. 28cm. ISBN 995564608X. Du-lingva (E, litova). Ok koloraj reproduktaj laŭ pentraĵoj de M.K. Ĉiurlionis kun versoj verkitaĵ de S. Nérís laŭ iliaj motivoj; en apartaj kajeroj. € 9,90

Esperanto – nemzetközi nyelv. László Szilvási. Budapest: Lingvostudio, 2004. 242+80p. 25cm. ISBN 963216749X / 9632177142. Kun aparta kajero de taskfolioj. Bone strukturita 10-leciana kurso por hungarlingvanoj, kun ampleksaj apendicoj. € 19,50

Internacia Kongresa Universitato 2005. Vilno, 23-30 julio 2005. Red. Amri Wandel. Rotterdam: UEA, 2005. 113p. 30cm. Prelegoj de H.M. Maitzen, A. Wandel, I. Svarcáitė, H.G. Frank, V. Benczik, A. Gudavičius, J. Lindstedt, Shigeki Nagamachi, T. Witkam, J. Edwards, A.D. Duličenko. € 7,80

Internacia Sciencista Dokumentaro 2004-2007. San Marino: AIS, 2005. 325p. 20cm. Kun fotoj.

Etimologia vortaro de la propraj nomoj. André Cherpillod. Rotterdam: UEA, 2005. x + 227p. 21cm. ISBN 9290170891. La etimologio de pli ol 4300 nomoj geografiaj, religiaj, personaj, dinastiaj kaj multaj aliaj. € 19,50. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Fotoalbumo, La. Romano. Dua volumo. Trevor Steele. Vieno: IEM, 2005. 165p. 23cm. ISBN 3901752269. Daŭrigo de la sagado de aŭstralia familio. € 15,00

Iam, kiam. Bruna Ŝtono (pseŭd.). Moskvo: Impeto, 2005. 128p. 17cm. ISBN 5716101291. Kun desegnaĵoj de Anastasija Bašlikova. Kelkdeko da originalaj poemoj dividitaj en kvin ciklojn. € 6,00

Informaciteorio / Informations-theorie. Por komunikaci-scienlistoj / für kommunikationswissenschaftler. Helmar G. Frank, Natalja G. Maksimova. Paderborn / München: SAIS Nitra IfK / KoPäd, 2004. 278p. 21cm. ISBN 8096742566 / 3935686986. Kursmaterialo pri Elementoj de informaciteorio kaj Elementoj de la kodaciteorio. € 20,10

Internacia Kongresa Universitato 2005. Vilno, 23-30 julio 2005. Red. Amri Wandel. Rotterdam: UEA, 2005. 113p. 30cm. Prelegoj de H.M. Maitzen, A. Wandel, I. Svarcáitė, H.G. Frank, V. Benczik, A. Gudavičius, J. Lindstedt, Shigeki Nagamachi, T. Witkam, J. Edwards, A.D. Duličenko. € 7,80

Internacia Sciencista Dokumentaro 2004-2007. San Marino: AIS, 2005. 325p. 20cm. Kun fotoj.

Adresoj, fakoj kaj lingvokapabloj de centoj da sciencistoj. € 18,60

Jan Amos Komenský. Heroldo de moderna pedagogiko. Józef Paweł Bieliński. Toruń: Flamo, 2002. 16p. 21cm. € 2,70

Jen nia mondo 1. J.C. Wells k.a. London, 2005 (repr.). 66p. 22cm. ISBN 0906632064. Kurso kun spritaj dialogoj. € 9,30

Kiam bestoj parolis 2. Pliaj rakontoj el Afriko. Div. afrikaj aŭtoroj. Red. Katelina Halo, Anna Löwenstein. El afrikaj lingvoj trad. diversaj. Esperanto por Evoluoj, [2005]. 43p. 21cm. 8 rakontoj el 3 landoj. € 3,00

Klaŭstralo. Pri la plej bona ŝtatformo kaj la nova insulo Klaŭstralo. István Becjczy. El la nederlanda trad. I. Ertl. Rotterdam: Bero, 2005 (2-a eld.). 52p. 21cm. Utopia novelo. € 4,50

Konfeso. Poeziaj provoj. Vladimir Samodaj. Moskvo: Eŭropa Jura Universitato Justo, 2005. 119p. 21cm. Plejparte originalaj poemoj, sed ankaŭ tradukoj el la rusa, ukraina kaj aliaj lingvoj. € 6,00

Kongresa libro de Universala Kongreso. Rotterdam: UEA, eldonata ĉiujare. 144p. 21cm. ISSN 00833851. Kun fotoj. Manlibro kun detala programo pri UK kaj adresaro de partoprenantoj. € 6,00

Legendo pri galaksa koro. Galaktikos ŝirdies sakmė. Povilas Antanas Kaunas. Ilustraĵoj de Vladimiras Beresniovas. El la litova trad. L. Stražnickas. Kaunas: Varpas, 2005. 78p. 21cm. ISBN 9955646020. Scienc-fikcia rakonto. € 4,80

Litovaj popolkantoj. Litova etnografia kulturo de folkloro kaj popolkantoj. Ars tekonika / Litova E-Asocio, 2005. 32p. 15cm. Kun muziknotoj. Pli ol dudek litovaj popolkantoj en la litova kaj en Esperanta versio; kun mallongaj prezentoj de la litova etnografia kulturo kaj de la litovaj popolkantoj. € 3,00

Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj. Marjorie Boulton. Rotterdam: UEA, 2005. 16p. 21cm. ISBN 9290170905. Prelego farita en la Malferma Tago de La Centra Oficejo de UEA la 27-an de novembro 2004, kiam la aŭtorino ricevis la Premion Onisaburo Deguchi. € 1,80. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Manlibro pri instruado de Esperanto. 13 aŭtoroj. Red. K. Kováts. Partizánske / Hago: Espero / ILEI, 2005 (2-a eld.). 150p. 21cm. ISBN 8096904264. Materialoj kolektitaj kadre de projekto por plivastigi kaj subteni instruadon de E inter junuloj. € 7,50

Mummy, why can't we all speak the same language? A book about languages. Nicole Else. Redfern: AEA, 2005. 38p. 30cm. ISBN 095866515X. Anglalingva. Facil-lingva informilo celanta precipe infanojn kaj junulojn. € 7,20

Ni kunvenu. Prilaboris J. Zielonka. Tarnów: Animzorgado de polaj esperantistoj, 2003 (5-a eld.). 318p. 16cm. Bind. Katolikaj preĝoj kaj kantoj. € 3,90

Planedo de la senfelaj simioj, La. Kaj aliaj rakontoj. Thierry Salomon. Budapest: Abonsoft, 2005 (2-a eld.). 28p. 21cm. ISBN 9632182138. Mallongaj scienc-fikciaj rakontoj. € 2,40



Por dulingveco en Eŭropo / Für Zweisprachigkeit in Europa. Argumentoj kaj dokumentoj / Argumente und Dokumente. Reinhard Selten, Helmar G. Frank. Paderborn: IFB-Verlag / Akademia Libroservo, 2005. 112p. 21cm. ISBN 3931263541 / 3929853167. Dulingva (E, germana). € 16,50

Pri Sokrato. Enkonduko, esperantigo, notoj de Spiros Sarafian. Ateno: Spiros Sarafian, 2005. 207p. 30cm. Trad. el la greka. Enhavas: *La apologio de Sokrato, Kritono, Fedono* de Platono kaj fragmentojn el *Memoraĵoj* de Ksenofono. € 27,00

Renkontiĝo en Pekino. Memore al la 89-a UK. Ĉefred. Yu Tao. Beijing: Nova Stelo, 2004. 172p. 21cm. ISBN 7801487508. Dulingva (E, ĉina). Plenkolora fotoalbumo pri la pekina UK. € 21,00

Simpozio pri interkultura komunikado. Symposium on Communication Across Cultural Boundaries. 10 aŭtoroj. Red. C. Kiselman. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 157p. 21cm. ISBN 8085853825. Ok tekstoj en E, du tekstoj en la angla, unu en la franca. Volumo rezultinta el simpozio okazinta en Gotenburgo, la 2-an kaj 3-an de aŭgusto 2003. € 15,00

Songeskoj. Arthur Schnitzler. El la germana trad. R. Hauptenthal. Saarbrücken: Iltis, 2005. 123p. 21cm. ISBN 3932807308. Nova traduko de novelo aluda al la songinterpretado de Freŭdo. € 13,50

Taglibro de mia frato. Memornotoj de Petr Ginz el la jaroj 1941-1942. Chava Pressburger. El la ĉeĥa V. Novobilská kaj V. Novobilská. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 136 + 23p. 20cm. ISBN 8085853795. Kun ilustraĵoj. Fragmentoj el la taglibro de judĉeĥa knabo pereinta en la Holokaŭsto nur 14-jara. € 24,00

Tilla. Spomenka Štimec. En la japanan trad. Mori Singo. Tokio: Sinpuu-sya, 2005. 290p. 19cm. ISBN

4797450827. Japanlingva versio de la samtitola originala romano. € 16,50

Traktato pri estigo de eŭropa konstitucio / Treaty establishing a Constitution for Europe. I-II-a partoj / Parts I-II. Red. Lajos Molnár. Budapest: Saluton, 2005. 79p. 24cm. ISBN 963867993X. Dulingva (E, angla). € 4,50

Unufoja lando, La. Vienkartinė šalis. Tomas Venclova. En Esperanton trad. I. Ertl, K. Long, Meva Maron. Kaunas: Varpas, 2005. 89p. 20cm. ISBN 9955646144. Dulingva (E, litova). Duedko da poemo de unu el la plej signifaj poetoj litovlingvaj. € 4,50

Vilnius. Gvidlibro tra la urbo. Tomas Venclova. En Esperanton trad. L. Stražnickas. R. Paknio leidykla, 2005. 215p. 22cm. ISBN 998683046X. Plene ilustrita, profesia gvidlibro, eldonita okaze de la 90-a UK. € 9,90

Vilnius kaj Trakai. Gvidlibro. Beata Piasecka. En Esperanton trad. L. Stražnickas. R. Paknio leidykla, 2005. 79p. 20cm. ISBN 9986830915. Kolorilus. gvidlibro pri la ĉefurbo de Litovio kaj pri la apuda historioje Trakai. € 7,50

Zakvortendenboekje / Poŝvortareto. Esperanto-Nederlands / Nederlands-Esperanto. Petro De Smedt. Antwerpen: FEL, 2005. 123p. 15cm. ISBN 9077066160. Kun plata kovrilo. 4549 oficialaj Esperantaj radikoj kaj 6341 nederlandaj vortoj. € 3,00

Zamenhofova ulice. Roman Dobrzyński. El Esperanto trad. J. Patera. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 258p. 21cm. ISBN 8085853809. Bind. Ĉeĥlingva versio de *La Zamenhof-strato*. € 18,00

NELIBROJ
Duonokulvitro, La. Aŭgusto Baissac. Aktoris C. Simmonds. Direktis P. Gubbins. Filmis J. Gubbins. Barlaston: EAB, 2005. 14 min. La unua publikigita originala drameto; kun aldonaj materialoj. Premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA 2005. DVD. € 9,90

Esperanto – pasporto

La angulo de



Esperantlingva Verkista Asocio
<http://www.everk.org/>

Leonard N. Newell: El « La ruĝa tramo »

Ho ŝvingiĝanta tram', ruĝega krio ardanta sur printempa mola sino de l' ŝaŭmaj arboj: Ŝtala geranio rimanta kun la lip' de stratanino (papavo de l' pavimo), vi ŝoviras tra blujaj retoj de la gazolino

kantante ĉefarion, kiu ŝiras l' obtuzan tondron rondan de l' sonato trafika; onda kontrapunkt' deliras

kaj ŝprucas sur krutajonoj de l' murplato - bruocano sur la granda vojo, flueta flustro en la fora strato.

Leonard N. Newell (1902-1968) estis angla asekuristo, kiu multe aktivis kiel poeto, novelisto, redaktoro. Liaj poemoj eniris la kolekton «Dekdu poetoj» (1934). En ĉi tiu ĉerpaĵo li fajne ekspluatas la interrilatojn de fonetiko kaj bildkreivo, de aliteracio kaj vortokoloro.



al la tuta mondo. Paul Gubbins k.a. El Cerrito: ELNA, 2005. 120 min. PAL. La fina parto de 15-leciana videntado kurso pri la Esperantaj lingvo kaj kulturo. Kun ekzercoj. € 76,50

Glumarko Florenco. 91a UK de Esperanto 2006. Rotterdam: UEA, 2005. Folio (12x20cm) kun 12 glumarkoj. € 1,20. Triona rabato ekde 3 ekz.

Komune. Ralph Glomp. Hamburg: Nigra Kato, 2005. 19 min; kun tekstoj. Kvin danceblaj kantoj. KD. € 7,50

Lingva diverseco. Martin Haase. Hamburg: Nigra kato, 2005. 40 min. Prelego de d-ro M. Haase en Herzberg, la 3-an de novembro 2001. KD. € 9,00

Liza kaj Paŭlo. Reto Rossetti k.a. Barlaston: EAB. 39 min. Tekstoj el la samtitola legolibro. KD. € 4,50

Londono kantas. Londona Esperanto-Floro. Barlaston: EAB. 51 min. 20 popularaj kantoj. KD. € 4,50

Muzikpluvo. Akordo. Enschede: Tekstoj, 2005 (reeldono). Kun tekstoj; 47 min. La unua KD de la nederlanda E-horo, enhavanta 25 kantojn el

diversaj landoj kaj lingvoj. € 13,50

Paroj: manĝaĵo. Green Rats, 2004. 36 plastumitaj kartoj. Para ludo por kaj infanoj kaj plenkreskuloj. € 3,30

Paroj: metiloj. Green Rats, 2005. 36 plastumitaj kartoj. Para ludo por kaj infanoj kaj plenkreskuloj. € 3,30

Rapidaj rakontoj. Green Rats, 2005. 72 ilustritaj ludkartoj. Ludkartaro por stimuli konstruadon de facilaj rakontoj. € 2,70

Reveno al Finnlando. La. Roman Dobrzyński, Osmo Buller. Varsovio, 2005. 30 min. Dokumenta televida filmo pri la vizito de polo al la nordfinna komunumo, kie li estis militkaptito. Esperanto rolis kiel ponta lingvo dum la filmado. DVD. € 12,00

Sendependa. Roĝer Borĝes. Partizanske: Espero. Kun tekstobroŝuro. Preskaŭ tuta horo da muziko reprezentanta tre diversajn stilojn, plejparte dancebla. KD. € 9,90

Urso-kurso. Esperanto Teachers' Association, 1997. Du KD-oj; suma daŭro 97 min. Legitaj fragmentoj el la populara lernilo por infanoj. € 5,40



Oficiala informilo

DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: K. Hoeijenbos. **Usono:** A. Shlafer.

DONACOJ

Ĝis la 1-a de decembro 2005

Ĝenerala kapitalo: **Japanio:** Legaco Nakamura Masami 14155,79. **Sumo ĉi-jara:** 55095,79.

Kapitalo Afriko: **Nederlando:** A. Nonima 7500,00. **Svedio:** L. Nordenstorm 200,00. **Sumo ĉi-jara:** 20991,76.

Konto Afriko: **Francio:** J. M. Cash 30,00. **Nederlando:** B. & W. Venema 50,00; C. & R. Bossong 25,00. **Svedio:** J. Hammarberg 62,40. **Sumo ĉi-jara:** 3739,37.

Fondaĵo Ameriko: **Finnlando:** T.

Sormunen 50,00. **Svedio:** J. Hammarberg 31,20. **Sumo ĉi-jara:** 305,10.

Fondaĵo Azio: **Japanio:** Y. Hotta, T. Huzisima, T. Isikawa, M. Nakatu, M. Osioka, T. Yamada, M. Yoshimura – po 14,26; H. Sano 7,11; T. Nomura 21,37; Y. Ueno 35,64. **Sumo ĉi-jara:** 2104,86.

Fondaĵo Canuto: **Nederlando:** R. Schmeits 10,00. **Sumo ĉi-jara:** 6499,32.

Fondaĵo Espero: **Francio:** J. M. Cash 30,00. **Germanio:** M. Cramer 200,00. **Nederlando:** W. Akkerman 17,00; A. & H. Bakker 202,00. **Sumo ĉi-jara:** 4567,22.

Fondaĵo Junularo: **Belgio:** N. Demeulenaere, M. Markarian – po 5,00. **Danio:** B. Chatterjee 5,00. **Francio:** J. Labarre 9,45; J. M. Cash, J. C. Dubois – po 30,00.

Germanio: W. Pfennig, H. Bludzuweit, N. Propadović – po 10,00; S. Berlin 5,00. **Pollando:** M. Skapski 5,45. **Sumo ĉi-jara:** 1939,94.

Volontula Fondaĵo: **Nederlando:** M. I. van der Horst, F. Kat – po 200,00; G. Peet 24,00; O. Buller 100,00. **Sumo ĉi-jara:** 844,00.

Ĝenerala kaso: **Kanado:** Otava E-Rondo (memore al C. McNab) 15,00. **Nederlando:** P. A. Buijnters 6,00; Roterdama E-Soc. Merkurio 250,00. **Svislando:** Ano Nimulo 1024,00. **Sumo ĉi-jara:** 2097,05.

Domrenoviĝo: **Nederlando:** A. van der Berg 100,00. **Sumo ĉi-jara:** 1529,25.

Al ĉiuj tre horan dankon! UEA

Esperanta Promeso-Banko

Ekde decembro 2005 la retejo *PledgeBank.com* estas je la dispono de la Esperanta komunumo. *PledgeBank* (Promeso-Banko) estas fondita de brita almozfondaĵo *mySociety*, la kreinto de pluraj retejoj, kiuj celas doni simplajn, sentebajn avantaĝojn kadre de la civitana kaj komunuma aspektoj de niaj vivoj.

Ĝuste kiel la iama promeso, kiun promociis Zamenhof "Mi promesas lerni Esperanton, sed nur se 10 milionoj da personoj faros same" – oni povas per *PledgeBank* krei promeson fari iun bonan agon, kondiĉe ke ankaŭ aliaj personoj helpas aŭ faros same. Ekzemple: "Mi promesas recikligi miajn rubaĵojn, sed nur se 100 samurbaĵoj faros same". "Mi promesas donacii al mia tempo al Internacia Televido, sed nur se 10 aliaj personoj faros same". "Mi promesas konstrui utilan retejon, sed nur se 1000 personoj promesas kontribui al ĝi". "Mi promesas sendi skatolon da libroj al la afrika Esperanto-centro, sed nur se 15 aliaj personoj sendos al mi pliajn librojn por pleni ĝin".

La temo povas esti enmovada aŭ ekstermovada, kaj la celo povas esti loka (ekz. "Mi promesas organizi iun okazaĵon en mia loka E-klubo se 5 aliaj membroj helpas min"), nacia ("Mi promesas ĉeesti iun demonstracion se 200 aliaj personoj venos kune") aŭ internacia ("Mi promesas esti senpagan interretan kurson pri io

se 15 personoj promesas sekvi ĝin"). En la mondo de Esperanto, plej multaj promesoj verŝajne estos internaciaj, sed ankaŭ estas aplikoj ĉirkaŭ kongresoj, ekz. "Mi promesas prepari prelegon pri ekzotikaj herboj, sed nur se 20 personoj promesas ĉeesti kaj aŭskulti ĝin ĉe iu kongreso".

Same kiel la kreintoj de la origina britangla versio, mi ne povas imagi ĉian eblan uzon de la servo, sed mi kredas, ke ĝi ja instigas homojn fari bonajn agojn, kiuj aliozake ne fariĝus. Mi kredas ankaŭ, ke ĝi plene taŭgas al la esperantista komunumo, kiu enhavas amason da individuoj, kiuj jam montriĝis pretaj fari nekutiman paŝon por io, kion ili kredas farinda kaj subteninda.

Mi invitas vin viziti la novan Esperantan vizaĝon de *PledgeBank* ĉe www.eo.pledgebank.com. Eble subskribu unu el la jam ekzistantaj promesoj (i.a. de Renato Corsetti), kaj malkovru pli da detaloj per la Respondaro: <http://www.eo.pledgebank.com/faq>.

Tim Morley

Kio estas STEB?

Antaŭ ol ekverki novan sciencon/teknikan artikolon, indas konatiĝi kun la jam uzataj esprimoj, terminoj, parolturnoj de la koncerna profesio.

Ĝuste tion ebligas la Sciencia kaj Teknika E-Biblioteko, STEB, kolektanta fakajn tekstojn en elektronika formo.

Kelkaj novaj temoj en STEB: *Enkonduko en la biologion; Farmakologio; Interplanedaj vojaĝoj; Diaĝnoza aparato por trakorkoj; Geokemia priskribo kaj komparo de tri hungaraj baŭsitkuŝejoj; Interreta telefonado; Sakeo - la japana trinkaĵo; Fabrikado de aerfiltriloj por eksplodmotoroj kaj klimato-aparato por maturiĝi viandajon; Kompleksa diaĝnoza aparato "medbiotech"; Matematikaj kaj statistikaj terminoj en PIV-2.*

Adreso de la biblioteko STEB: <http://www.eventoj.hu/>.

Teamo de STEB/Eventoj bonvenigas ankaŭ vin en la labor-teamo!

(Laŭ Ret-Info)

Estas tempo rekotizi por 2006!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de tiu ĉi revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA.



Sukcesa antaŭpremiero en Jokohamo

Dum la antaŭlasta oktobra semajnofino (21-23.10. 2005) okazis en Jokohamo la 92-a Japana Esperanto-kongreso. La belega japana havenurbo, kiu en la jaro 2007 gastigos la 92-an (kia koincido!) Universalan Kongreson de Esperanto, kunvenigis 370 esperantistojn. Al la kongreso aliĝis 550 personoj, sed 180 el ili per la aliĝkoto nur libervole subtenis la landan kongreson.



La kongreson inaŭguris la prezidanto de japana Esperanto-Instituto Sibayama Zyun'iti. La inaŭguron ĉestis kaj salutis ankaŭ vicurbestro de Jokohamo kaj japanaj movadgvidantoj. La estro de la organiza fako de JEI Inumaru Fumio prezentis al la partoprenantoj raporton pri la dumjara E-movado en Japanio. Dum la inaŭguro estis anoncitaj la premiito de la premio *Ossaka*, pro aktiva E-agado, Yamasaki Seiko, kaj la premiito de la belarta konkurso Aida Yayoi.

Dum tri fruktodonaj tagoj sub la ĉefa temo *Rekonu, Esperanto nun!* la kongreso okupiĝis pri movadaj, lingvaj kaj klerigaj demandoj, kaj sukcese laboris en diversaj sekcioj, oficialaj kunsidoj, fakkunveno, konversaciaj rondoj ktp.

La organizantoj invitis ankaŭ eksterlandajn esperantistojn el 5 landoj: Ĉinio, Mongolio, Rumanio, Rusio kaj Ukrainio, kiuj aktive kontribuis al la programo, prelegante, gvidante konversaciajn rondojn ktp. La aŭtoroj de tiu ĉi artikolo, kiel redaktoroj de la revuo *Komencanto*, rakontis pri ĝi kaj pri sia porsperanta agado.

Krom laboraj momentoj estis ankaŭ la distraj: gaja Amika Vespero, allogaj ekskursoj tra la urbo, bankedo en

granda restoracio kun ekzotikaj pladoj.

Dum la kongreso okazis ankaŭ kunsido de la Landa Kongresa Komitato, kiu jam aktive okupiĝas pri la preparado por la 92-a Universala Kongreso, okazonta en 2007 en Jokohamo.

La altnivele okazigita kongreso, dumkongresaj kontaktoj kun multaj japanaj E-aktivuloj, iliaj kuraĝaj iniciatoj kaj ideoj, forte konvinkas pri tio, ke Esperanto ĉi tie hejmas, kaj ke oni povas esti tute esperoplenaj pri la

sukceso de la 92-a UK en Jokohamo. Ne preterlasu la okazon viziti tiun mirindan urbon kaj ĝui la belecon de la lando kaj la varmecon de internacia amikeco!

Raja kaj Viktor Kudrjavcev



La kongresejo de la 92-a UK en 2007



La aŭtoroj dum ekskurso en Jokohamo

Ekspozicio en Kopenhaga Librofoiro

Dana Esperanto-Asocio partoprenis en la Kopenhaga Librofoiro, kiu okazis de la 18-a ĝis la 20-a de novembro, kun ekspozicio de libroj, revuoj, flugfolioj, kaj lingva konkuro.

Profesoro Robert Phillipson prelegis pri sia libro *Ĉu nur-angla Eŭropo?* kaj subskribis sian libron ĉe la stando post la prelego. Oni disdonis la materialon al kelkaj centoj da vizitantoj kaj pluraj tuj aliĝis al la kurso por komencantoj, kiu okazos fine

de januaro, gvidota de Radojica Petrović. Okazis ankaŭ intervjuo kun la studenta radio kaj la Kopenhaga televidprogramo. Ileana Schröder

Sur la foto: Robert Phillipson kun la prezidanto de DEA Ileana Schröder

Hispana tago en Pollando



Okaze de la Hispana Nacia Festo, la 12-an de oktobro, okazis malgranda festo en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando).

Partoprenis la festeton la gestudentoj de la hispana lingvo en tiu altlernejo, kie la instruado okazas en Esperanto.

La hispana profesoro Augusto Casquero instruas tie la hispanan lingvon (pere de Esperanto) kaj Esperanton.

Sur la fotoj videblas krom la profesoro kelkaj gestudentoj el Senegalio, Ĉinio, Japanio, Pollando, Tanzanio, Kenjo, Tunizio. Estas ankoraŭ aliaj gestudentoj, kiuj ne aperas sur la foto, el Albanio, Mongolio kaj Kongo.

Augusto Casquero

Galabovo, dommastro de la 57-a Bulgara

De la 2-a ĝis la 4-a de septembro 2005 okazis en la urbo Galabovo la 57-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio. La partoprenantoj metis florkronon al la monumento de la militaj pereintoj, trarigardis la etnografian muzeon kaj en la Kulturdomo spektis la komedion *Miskomprenita civilizacio*.

La Kongreson inaŭguris la kolonelo Kanjo Kanev, prezidanto de LKK. Personajn salutojn al la delegitoj esprimis Ljuben Delčev, vicurbestro de Galabovo, kaj Janka Petrova, prezidantino de la Komunuma Konsilio. Kanjo Kanev kaj Radi Radev, vicprezidanto de LKK, trailegis salutleterojn, kiuj venis de pli ol dudek landoj. Speciale oni dankis al esperantistoj el Razgrad, kiuj donacis vestojn por la loĝantoj de Galabovo, antaŭ nelonge suferintaj pro granda inundo.

La prezidanto de BEA Petar Todorov trailegis la jarraporton, en kiu estis prezentita la riĉa kaj multflanka agado de BEA.

Li emfazis la grandan intereson al la Internacia Lingvo en la lando dum la lasta jaro. Pri Esperanto kaj la movado en Bulgario informis pluraj radiostacioj, televido, ĵurnaloj kaj revuoj. Ankaŭ la financa stato de BEA estas tre bona.

La kunsidojn gvidis Bojdar Leonov kaj Georgi Mihalkov. La estraro de BEA donis diplomojn kaj honorajn bendojn al novaj honoraj membroj.

Post la kunsidoj estis prezentita riĉa artprogramo. La delegitoj kaj la gastoj estis ravitaj de la grandioza dancspektaklo Legendo pri Galabovo, en kiu partoprenis lernantoj el la urbo.

Sekvis amuza vespero en restoracio, kun muziko kaj viglaj dancoj. En la Kongreso gastis esperantistoj el Serbio kaj Montenegro kaj el Rumanio. Oni esprimis la opinion, ke la 57-a Kongreso de BEA estis unu el la plej bone organizitaj kongresoj de la Asocio.

Kanjo Kanev kaj Georgi Mihalkov

Sur la foto: Georgi Mihalkov (Julian Modest) dum la kongreskunsido, kiun li gvidis



Manol Ĉolev (1903-2005), iama delegito kaj fakdelegito pri turismo kaj paco, esperantisto ekde 1919, mortis en Velingrad (Bulgario). Pro sia Esperanto-ago li ricevis la statan ordenon "Kiril i Metodi" en 1963.

Ryszard Grzybowski (1956-2005), honora ano de Monda Turismo, forpasis la 30-an de oktobro en Bydgoszcz (Pollando), kie li estis fakdelegito pri gastronomio kaj dum pluraj jaroj estris la klubejon "Esperanto" kaj administris la hotelon "Esperanto".

Li estis estrarano de "Esperantotur" kaj kunposedanto de la firmao "Espero".

Helvi Jaakkola (1917-2005), iama estrarano de la finna sekcio de KELI, forpasis la 26-an de oktobro en Helsinko. En la 80-aj jaroj ŝi prizorgis E-kurson en la populara porknaba revuo Joka Poika.

Nikolao Kriveckij (1945-2005) forpasis la 22-an de novembro en Ternopil (Ukrainio). Prezidanto de la loka klubo, li ankaŭ verkis poemojn. En lia esperantigo aperis

poemaroj de B. Andrušiv kaj B. Melničuk.

Nakamura Masami (1943-2005), dumviva membro, forpasis la 12-an de oktobro. Li estis estrarano de Japana Esperanto-Instituto 1975-1982 kaj dum multaj jaroj regule helpis en la oficejo de JEI kiel volontulo. En siaj lastaj vivotagoj li faris gravan donacon al JEI por subteni la preparojn de la 100-jariĝo de la japana movado, de UK en Jokohamo kaj de Esperanta-japana vortaro. Memore al li, lia vidvino Koganei Mariko faris post lia

forpaso grandan donacon al UEA. **Neus Moly i Martí** (1944-2005) forpasis la 19-an de novembro en Barcelono. Ŝi estis prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio (1999-2002), estrarano de KEA kaj delegito de UEA en Barcelono. Ŝi instruis Esperanton en la Barcelona Unesko-klubo kaj estis, kun sia edzo, la animo de la tiea Esperanto-grupo.

Werther João de Lima Sacramento (1919-2005), delegito en Cacem (Portugalo) forpasis la 4-an de novembro. Li estis membro de UEA ekde 1945.

Stato de la UK-aligĝoj

Ĝis la 8-a de decembro, kiam ankoraŭ ne estis sentebila la fino de la unua kotizperiodo, 436 esperantistoj el 41 landoj jam aliĝis al la 91-a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco (29 julio – 5 aŭgusto 2006). Kiel atendite, la kongreslando Italio staras ĉe la pinto kun 57 aliĝintoj, proksime sekvate de Francio (53). Inter la dek plej multnombraj landoj estas krome Germanio (46), Brazilo kaj Japanio (po 24), Nederlando (23), Rusio (17), Belgio kaj Pollando (po 16), kaj Danio (15).



Nova membrokarto de UEA

La Centra Oficejo de UEA komencis liveri al la novaj membroj de la Asocio novstilan membrokarton.

Temas pri kreditkartformata, plastumita kaj kolora karto, kies dezajno estas inspirita de la interreta hejmpaĝo de UEA.

La unuan ekzempleron de la karto ĝenerala direktoro Osmo Buller transdonis al prezidanto

Renato Corsetti dum sia laborvizito al Florenco la 18-an de novembro. Krom la novaj membroj de UEA, la novstilan karton ricevos inter la unuaj ankaŭ la komitatanoj de UEA kaj TEJO kaj la membroj de Societo Zamenhof. ☆

INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKECO

La lasta semajno de februaro (21 ĝis 27) kiel ĉiujare estos sub la devizo **Amikeco trans limoj**. Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de la internacia lingvo, ĝi estas taŭga okazo por komuna evento kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.



● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ● lerni interkulture ●

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- trisemajna intensa lernado de Esperanto
- por komencantoj ĝis akademianoj
- internaciaj instruistaro kaj studentaro
- riĉa vespera kaj semajnfina programo

En 2006 NASK okazos denove ĉe la monde konata interkultura alternejo, *The School for International Training*, en nordorienta Usono. La instruista skipo pretigas trinivelan studprogramon kiu emfazas la uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno kaj kunlaboro. Speciale: programo, Arto-ŝoko, de Katalin plus cerbamikaj paroligaj aktivoj de Sylvain.



Datoj: 3-21 julio 2006

Loko: Brattleboro, Vermonto (facile atingebla de Bostono, Novjorko aŭ Hartfordo)

Instruistoj: Katalin Kováts (Hungario, Nederlando), Sylvain Lelarge (Francio, Nederlando) kaj Lee Miller (Usono)

Kotizoj: loĝado en dultaj ĉambroj kun manĝoj 700US\$, kurskotizo 1015 US\$.

Stipendioj: haveblas.

Por pliaj informoj: <http://esperanto.org/nask/> aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512; tel. (360) 754-4563; retpoŝto eddyellen@aol.com

SERIO "ORIENTO-OKCIDENTO" de UEA

Serio "Oriento-Okcidento" estas la plej longedaŭra el la kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko. En ĝi aperis 40 numeritaj kaj 2 nenumeritaj libroj, tradukitaj el pli ol 20 lingvoj.

- *1. **Malsata ŝtono.** Rabindranath Tagore. El la bengala trad. L. Sinha. Malmö: Eldona Societo E, 1961. 128p.
- *2. **Rakontoj de Oogai.** Mori Oogai. El la japana trad. Mikami Teruo, Miyamoto Masao, Matuba Kikunobu, Nozima Yasutaro. Tokio: Japana E-Instituto, 1962. Represo 1969. 117p. Bind. €9,00.
- *3. **La naŭzo.** Jean-Paul Sartre. El la franca trad. R. Bernard. Rotterdam: UEA, 1963. 222p.




- 4. **Kalevala.** Elias Lönnrot. El la finna trad. J. E. Leppäkoski. Helsinki: E-Asocio de Finnlando, 1964. Dua eld. 1985. 392p. Bind. €12,00.
- 5. **Martin Fierro.** José Hernández. El la hispana trad. E. Sonnenfeld. La Laguna: J. Régulo, 1965. 289p. €7,20.
- 6. **La tragedio de Reĝo Lear.** William Shakespeare. El la angla trad. K. Kalocsay. Rotterdam: UEA, 1966. 156p. €6,90.

- 7. **Kvin virinoj de amoro.** Ihara Saikaku. El la japana trad. Miyamoto Masao. Oosaka: Pirato, 1966. Dua eld. 1989. 159p. Bind. €20,70.
- 8. **La splendo de Parizo.** Charles Baudelaire. El la franca trad. P. Lobut. København: Koko, 1967. 122p. €5,40.
- 9. **El la vivo de Syunkin.** Tanizaki Yzunitiro. El la japana trad. Miyamoto Masao kaj Isiguro Teruhiko. Oosaka: Pirato, 1968. 145p. €9,00.

- *10. **La Nobla Korano.** El la araba trad. I. Chiussi. Fotorepreso de la dua eldono, 1977. 20+667p. Dulingva eldono. Bind.
- 11. **Neĝa lando.** Kawabata Yasunari. El la japana trad. Konisi Gaku. Tokio: Japana E-Instituto, 1971. Dua eld. 1992. 119p. €12,30.
- 12. **Je la flanko de la profeto.** Italo Chiussi. Originale en E. Antverpeno: TK, 1978. 362p. €10,50.
- *13. **Brand.** Henrik Ibsen. El la norvega trad. E. A. Haugen. Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1968. 320p.

- *14. **La luzido.** Luiz Vaz de Camões. El la portugala trad. L. H. Knoedt. Chapeco: Fonto, 1980. 464p.
- *15. **Elektitaj fabeloj.** Ivan A. Krilov. El la rusa trad. S. G. Rublov. Antverpeno-La Laguna: TK/Stafeto, 1979. 336p.
- 16. **La sonetoj.** William Shakespeare. El la angla trad. W. Auld. Pizo: Edistudio, 1981. 326p. Bind. Dulingva eldono. €12,00.

- *17. **Tutmonda sonoro.** El diversaj lingvoj trad. K. Kalocsay. Budapest: Hungara E-Asocio, 1981. Duvoluma. 664p. Bind. (Brok.) €9,90.



- 18. **Elpafu la sagon.** El diversaj lingvoj trad. T. Sekelj. Rotterdam: UEA, 1983. 188p. Broŝ. €7,50. Bind. €9,60.
- 19. **La suferoj de la juna Werther.** J.W. von Goethe. El la germana trad. R. Hauptenthal. Heckenaldheim: Berthold Faber, 1984. 92p. Bind. €16,50.
- 20. **Loulan kaj Fremdregionano.** Inoue Yasushi. El la japana trad. Miyamoto. Masao. Tokio: Japana E-Instituto, 1984. 96p. €13,50.
- 21. **Montara vilaĝo.** Chun-Chan Yeh. El la angla trad. W. Auld. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1984. 264p. Bind. €3,60.

- *22. **Sinjoro Tadeo.** Adam Mickiewicz. El la pola trad. A. Grabowski. Varsovio: Pola E-Asocio, 1986. 333p.

- *23. **Sanga nupto kaj La domo de Bernarda Alba.** Federico García Lorca. El la hispana trad. M. Fernández. Madrid: Ediciones La Misma, 1987. 229p.

- 24. **Laŭdo de l' stulteco.** Erasmo de Roterdamo. El la latina trad. G. Berveling. Rotterdam: UEA, 1988. 111p. €6,00.

- 25. **Aŭstralia antologio.** Redaktis A. Towsey. El la angla trad. diversaj. Pizo: Edistudio, 1988. 431p. Bind. €21,00.

- 26. **La majstro kaj Margarita.** Mihail Afanasjeviĉ Bulgakov. El la rusa trad. S.B. Pokrovskij. Sverdlovsk: Sezonoj, 1991. 376p. Bind. €12,00.

- *27. **Cent jaroj da soleco.** Gabriel García Márquez. El la hispana trad. F. de Diego. Chapeco: Fonto, 1992. 372p.

- *28. **Krimo kaj puno.** Fjodor Dostojevski. El la rusa trad. A. Parfentjev. Jekaterinburg: Sezonoj, 1993. 488p. Bind.

- 29. **Klera edzino.** Upendranath Gangopadhye. El la bengala trad. P. Daŝgupto. Piza: Edistudio, 1994. 182p. Bind. €12,00.

- 30. **Antologio Latina** – Volumoj 1 kaj 2. Kompilis kaj trad. G. Berveling. Chapeco: Fonto, 1998. 576p. €30,00.

- 31. **La metamorfozo.** Franz Kafka. Trad. M. Nervi. Piza: Edistudio, 1996. 75p. Bind. €12,00.

- 32. **Malvivaj animoj.** Nikolaj V. Gogol. El la rusa trad. V. Vyčegjanin. Jekaterinburg: Sezonoj, 2001. 223p. Bind. €18,00.

- 33. **La lada tambureto.** Günter Grass. El la germana trad. T. Chmielik. Bielsko-Biala: Kleks, 2000. 533p. Bind. €36,00.

- 34. **La libro de la mirindaĵoj.** Marko Polo. Trad. D. Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. €33,00.

- 35. **Ĉe akvorando.** El la ĉina trad. Laŭlum, Beijing: Ĉina Fremdlingva Eldonejo, 2004. 1830p. Tri volumoj. €120,00.

- 36. **La Dharmo-pado.** El la palia trad. G. Gálmo. Stockholm: Eldona Societo E, 2002. 110p. Broŝ. €15,00. Bind. €18,00.

- 37. **Sensorteco.** Imre Kertész. El la hungara trad. I. Ertl. Budapest: Eldonejo Aranygolyó, 2003. 207p. Bind. €13,50.

- 38. **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk dum la mondmilito.** Jaroslav Hašek. El la ĉeĥa trad. V. Víňa. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2004. 711p. Bind. €39,00.

- 39. **Leteroj de Paŭlo kaj lia skolo.** El la helena trad. G. Berveling. Chapeco: Fonto, 2004. 253p. €19,50.

- 40. **Eŭĝeno Onegin.** Aleksandr Puŝkin. El la rusa trad. V. Melnikov. Kaliningrado: Sezonoj, 2005. 256p. €19,80.

- SENNUMERAJ:

- La Dia Komedio.** Dante Alighieri. El la itala trad. G. Peterlongo. Milano: Edizione S.I.E.I., 1963. Dua eldono, 1979. 55+709p. Luksa dulingva eldono. Bind. €30,90.

- Aniara.** Harry Martinson. El la sveda trad. W. Auld kaj B. Nilsson. Malmö: Eldona Societo E, 1979. 174p. Bind. €12,00.

- **elirpita*

Sesona rabato por ajna kombino de tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Ĉi tiu oferto validas ĝis la 1-a de aprilo 2006.

NIAJ PASINTJARAJ ELDONAĴOJ



Vojaĝo en Esperanto-lando. Boris Kolker. Krestomatia gvidlibro al la Esperanta kulturo kun ekzercoj, por memlerni aŭ grupo. Tria eldono. 280p. 24cm. Prezo: €18,00.



Etimologia vortaro de la propraj nomoj. André Cherpillod. La etimologio de pli ol 4300 nomoj geografiaj, religiaj, personaj, dinastiaj kaj multaj aliaj. x+227p. 21cm. Prezo: €19,50.



Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005. Ziko Marcus Zikosek. Ilustrita rigardo super la ĉefa kaj plej granda regula renkontiĝo de esperantistoj. 197p. 24cm. Prezo: €30,00 (bind.); €21,00 (broŝ.).



Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj. Marjorie Boulton. Prelego farita en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 27-an de novembro 2004, kiam la aŭtorino ricevis la Premion Onisaburo Deguĉi. 16p. 21cm. Prezo: €1,80.

Triona rabato por mendo de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo sendotaj samtempe al la sama adreso.

KITAKTO kun la mondo!



KITAKTO estas la plej vaste legata junuleca revuo pri landoj, popoloj, kulturoj, socio kaj politiko – por ĝeĵunuloj kaj ĉiuj kiuj estas junaj en la koro. **KITAKTO** aparte taŭgas por instruistoj kaj kienkontoj: parto de la artikoloj aperas en la lingvaĵoj "facila" kaj "tre facila". **KITAKTO** estas varia kaj amuzo – intereso por ĉiuj operas 6-foje jare. Abonu rekte de UEA aŭ pere de via kotizperanto.

ABONTARIFO 2005

Aŭstralio	34 dolaroj	Francio	22 eŭroj	Nederlando	22 eŭroj
Aŭstrio	22 eŭroj	Germanio	22 eŭroj	Norvegio	165 kronoj
Belgio	22 eŭroj	Hispanio	22 eŭroj	Pollando	45 zlotoj
Brazila	10 eŭroj	Israelo	16 eŭroj	Portugalo	22 eŭroj
Britio	14 pundoj	Italio	22 eŭroj	Svedio	200 kronoj
Danio	160 kronoj	Japanio	2700 enoj	Svislando	31 frankoj
Finlando	22 eŭroj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!

ANONCU EN JARLIBRO 2006!

En la Jarlibro, anonco pri Esperanto-aranĝoj, libroj, gazetoj k.a. varoj atingos pli vastan publikon ol en iu ajn alia Esperanto-eldonaĵo. Pli ol 6000 esperantistoj vidos vian reklamon tra la tuta jaro.

	Movada prezo	Ekstermovada prezo
Kvarona paĝo	€ 65	€ 130
Duona paĝo	€ 120	€ 240
Tuta paĝo	€ 220	€ 440
Kovrilpaĝo	€ 440	€ 880

Por ekstermovada reklamo vi ricevos 30% kiel makleraĵon. Anoncmendiloj haveblas en Esperanto, la angla, franca, germana kaj nederlanda. La limdato por la mendoj estas la 28-a de februaro 2006.

